UNESKO
Kuriero
Julio-Septembro 2024

La profunda heredaĵo de sklaveco



- Sklav-negoco kaj **virinoj:** forgesita historio
- **Gorée,** insulo de memoro
- Kilomboj, centroj de **afrikbrazila** rezistado
- Esteban Montejo, la historio de la lasta cimarona sklavo de **Kubo**

NIA GASTO

Patrick Chamoiseau, Franca verkisto (Martiniko): "Ni devas havi la riĉecon de ĉiuj lingvoj de la mondo"

ISSN 2096-9082
09
9 772096 908249
中国新道 EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn
unesco

Abonu la presitan version en ĉiu trimonato aŭ abonu 100% senpage la bitversion.

Malkovru niajn ofertaĵojn

http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn;
https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero//

Sekvu la lastajn novaĵojn de *Kuriero*

@unescocourier

Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu *UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro (*Open Access*), laŭ reguloj de UNESKO por publikaĵoj.

2024 • n-ro 3 • Eldonata ekde 1948

UNESKO-Kuriero estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizajo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri inter nacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

Direktoro: Matthieu Guével

Ĉefredaktoro: Agnès Bardon

Asista redaktoro: Katerina Markelova

Sekcia redaktoro: Chen Xiaorong

Angla redaktoro kaj socia retejo:

Anuliina Savolainen

REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:
Angla: Gina Doubleday
Araba: Fathi Ben Haj Yahia
Ĉina: Chen Xiaorong kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo
Franca: Christine Herme (provlegado)
Hispana: Laura Berdejo
Rusa: UNESKO

Fotoj kaj ilustraĵoj: Danica Bijeljac

Kunordigado pri traduko:
Hélène Menanteau

Administracia kaj redakcia asistanto:
Carolina Rollán Ortega

Produktado:
Eric Frogé, Ĉefa Asistanto Produktada

Fasonado: Delphine Chéret-Dogbo

Kovrila bildo: © Sylvie Serprix

Internulo : Wang Wenjin

Kuneldonaj redaktoroj:

Esperanto: Chen Ji
Kataluna: Jean-Michel Armengol

Informo kaj Kopirajtoj:
courier@unesco.org
7, place de Fontenoy,

75352 Paris 07 SP, France

© UNESCO 2024

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (*http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/*). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (*http://en.unesco.org/open-access/*). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de flanke de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

Malgarantio: UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.

Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko

La bitversio haveblas senpage ĉe
http://www.espero.com.cn/
http://esperanto.china.org.cn/
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Supera organizo: Ĉina Internacia Komunika Grupo (ĈIKG)
Subtena organizo:
Universala Esperanto-Asocio
Eldono: El Popola Ĉinio
Prezidanto: Chen Wenge
Ĉefredaktoro: Zhao Jun
Vicprezidantoj: Wang Hanping kaj Yu Wen
Vicĉefredaktoro: Lin Chongzhen
Ĝenerala administristo: Zhao Quanyong
Aganta ĉefredaktoro: Chen Ji
Tradukantaro: El Popola Ĉinio kaj UEA-Teamo
Provlegantoj: Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj José Antonio del Barrio
Presita de Limigita Kompanio Yincheng-Beichuang en Pekino
Kunlaboranto: Zaozhuang-a Universitato

Adr: P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio
Tel: +86-10-68996130
+86-10-68996590
Retpoŝto: lamondo@163.com
CN 10-1711/C ISSN 2096-9082
Prezo: 6.8 eŭroj

UNESKO Kuriero

Enhavo

4 **LARĜA ANGULO**

La profunda heredaĵo de sklaveco

De politika rekono al demandoj por justeco 5
Myriam Cottias

Karibio postulas kompenson 8
Verene Shepherd

Sklav-negoco kaj virinoj: forgesita historio 11
Hilary McD. Beckles

Rhodnie Désir, dancanta la pasintecon 13
Frédérique Doyon

Gorée, insulo de memoro 15
Clémence Cluzel

Kilomboj, centroj de afrikbrazila rezistado 18
Flavio Gomes

Esteban Montejo, la historio de la lasta cimarona sklavo de Kubo 20
Guillermo G. Espinosa

22 **ZOMO**

La ribelaj rultabulistinoj de Koĉabambo, en Bolivio 22
Fotoj: Luisa Dörr

32 **IDEOJ**

Vojaĝado sen postlasi spurojn 32
Joseph M. Cheer

36 **NIA GASTO**

“Ni devas havi la riĉecon de ĉiuj lingvoj de la mondo” 36
Intervjuo kun Patrick Chamoiseau

40 **PLI DETALE**

Dua Kuriero-Forumo: Kulturaj interŝanĝoj laŭlonge de la Silkaj Vojoj 40

Ĉefartikolo

La historio de sklavigo formis nian modernan mondon kaj ankoraŭ influas nin. Ĉi tio estas evidenta en la profunda kaj foje sistema rasismo kiu persistas tutmonde, precipe kontraŭ posteuloj de afrikanoj, kaj tio devenas de malsamaj historiaj fenomenoj kiuj kutimis pravigi la miton de afrika “malsupereco”, ankaŭ dum la Klerisma Periodo.

Cetere, la transatlantika sklav-negoco, dum ĝi starigis la ekonomian dominadon de koloniaj potencoj, profunde disrompis sociajn strukturojn en la afrika kontinento. Tiu ĉi fenomeno, ligita al la multobliĝo de koloniaj sklavec-bazitaj ekonomioj en la pasintaj jarcentoj, malfaciligas klopodojn al paca evoluo. Se ni devas konstrui pli inkluzivigan mondon, ni devas kompreni kaj teni en konsidero la pezon de ĉi tiu heredaĵo.

La historio de sklavigo estas ankaŭ historio de rezisto kaj kreado. Per rezisto, sklavigitaj popoloj asertis la universalecon de homaj rajtoj. Kontraŭ ĉiuj ebloj, ili evoluigis artan heredaĵon kaj agrikulturajn kaj teknologiajn sciojn, de kultivado de rizo al regado de fero, kiuj atestas eksterordinaran kapablon restariĝi.

La historio kaj efiko de sklavigo, kelkaj el kies plej gravaj aspektoj estas prezentitaj en ĉi tiu numero de la Kuriero, estas analizitaj de la UNESKO-programo Vojoj de Sklavigitaj Homoj (nomita projekto Sklavo-Vojoj ĝis 2022) ekde ĝia kreado, en 1994, iniciatita de Benino kaj Haitio. UNESKO-pledado kondukis al la agnosko fare de Unuiĝintaj Nacioj pri la transatlantika sklav-negoco kaj sklavigo kiel krimo kontraŭ la homaro en 2001. Ankaŭ la starigo, fare de UNESKO, de Internacia Tago por la Memoro de Sklavnegoco kaj ĝia Forigo (23-a de aŭgusto) omaĝas sklavigitajn popolojn kaj honoras iliajn heredaĵojn.

La programo ebligis al ni reliefigi ĉi tiun heredaĵon, kaj levi la demandon pri traŭmo kaj memoro dum efektivigado de inkluzivigaj politikoj. Per la Unesko-Reto de Lokoj de Historio kaj Memoro Ligitaj al Sklaveco kaj Sklavnegoco, la programo ankaŭ antaŭenigas esploradon kaj kontribuas al la evoluo de daŭripova ekologia turismo pere de la kunlaboro de urboj, kies historio estas ligita al sklavigo.

Dum ni festas, en 2024, la tridekan datrevenon de la programo Vojoj de Sklavigitaj Homoj, ni devas mobilizi homojn por pliigi konscion pri ĉi tiu historio kaj taksi ĝiajn pezon kaj sekvojn en la hodiaŭaj simboloj kaj realoj. Ĉi tio kontribuos por la konstruado de pli inkluzivigaj socioj, pli justaj kaj pli respektemaj je rajtoj.

Gabriela Ramos
Asistanta Ĝenerala Direktoro de UNESKO
por Sociaj kaj Homaj Sciencoj

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)

La profunda heredaĵo de sklaveco



◥ *La "Pordo de Ne-Reveno" de la Domo de Sklavoj sur Insulo Gorée (Senegalo), simbolo de la sklavnegoco.*

© OUR PLACE World Heritage Collection

Myriam Cottias

Historiisto kaj esploristo ĉe la Franca Nacia Centro por Scienca Esplorado (CNRS laŭ mallongigo en la franca), Myriam Cottias estas prezidanto de la Internacia Scienca Komitato de la UNESKO-programo »Vojoj de Sklavigitaj Homoj: Rezisto, Libereco kaj Heredaĵo".

Longe reduktita al silento, la memoro pri la afrika sklavnegoco ekaperis en la sekvo de la Dua Mondmilito. Kvankam ĝi nun estas simbole agnoskata per memorleĝoj kaj naciaj kaj internaciaj kunmemoradoj, ĝiaj efikoj daŭre estas akute sentataj. Ĉi tio videblas en la manifestiĝoj de diskriminacio kaj rasismo, kiuj ankoraŭ influas afrikdevenulojn.

"Rompi la silenton". Antaŭ 30 jaroj, en 1994, tio estis la ĉefa celo de la UNESKO-programo La Vojo de Sklavoj, nuntempe konata kiel "Vojoj de Sklavigitaj Homoj" por elmeti al la publika konsidero la memoron pri tiu homa tragedio, kiu kaŭzis la deportadon de 12.5 milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj el Afriko al Ameriko inter la 16-a jarcento kaj la mezo de la 19-a jarcento. Oni taksas, ke pli ol unu miliono da viroj kaj virinoj estis deportitaj el marbordaj regionoj de Orienta Afriko kaj Hinda Oceano. Krom tiu terura cifero, kalkulita surbaze de mondskala analizo de arĥivoj, ĉirkaŭ sep milionoj da kaptitoj mortis survoje en la internaj sklavnegocaj itineroj en Afriko. Origine venintaj el Okcidenta Afriko – el regiono situanta inter Senegambio kaj Centra Afriko – kaj Orienta Afriko, sklavoj estis deportitaj ĉefe al Brazilo (40%), al Karibio (60%) kaj en malpli granda skalo al Usono. Ĉi tiu sistemo de homa ekspluatado pere de perforto kaj dominado – sklaveco – konsistigis siatempe la unuan tutmondan ekonomion.

La deportado de afrikaj gehomoj ebligis la produktadon de varoj – sukero, kafo, indigo kaj kotono – por Eŭropo, kaj kreis socian hierarkion en ĉiu kolonia socio, kie koloro kaj civila statuso estis uzataj por klasifiki la loĝantarojn laŭ rasaj kriterioj. Ĉiun homon oni rangigis laŭ kriterioj en kiuj la rasa faktoro (pli aŭ malpli "blanka") havis prioritaton super la socia faktoro (pli aŭ malpli riĉa). La "blanka libera sklavposedanto" estis metita en pozicion de supereco rilate al la "nigra sklavo" lokita ĉe la fundo de la skalo, kio estigis strukturan kaj simbolan perforton, kiu estis transdonita de generacio al generacio.

Silenta tragedio

Sed dum longa tempo ĉi tiu tragedio estis silentigita je nacia nivelo. Silento plejparte regis en la konstruado de nacia identeco – en Eŭropo kiel en Afriko, en Karibio kiel en Usono, en Sudameriko aŭ Azio kiel en la landoj de la araba duoninsulo. Tamen, sklaveco ludis gravan rolon en la historio de Eŭropo kaj precipe de Usono, konstruante ilian riĉecon, formante iliajn ideologiojn kaj influante iliajn filozofiajn principojn. Tiu graveco tamen ne estis plene agnoskita, same kiel ne estis agnoskitaj la heredaĵoj produktitaj de la historio de sklaveco.

> **"La rekono de la memoro pri sklaveco ekaperis iompostiome post la Dua Mondmilito**

Sed ĉu eblas enterigi en silenton la efikojn de rasaj antaŭjuĝoj, rasismo kaj diskriminacio suferitaj de la homoj surportantaj la historion de sklaveco? Dum ĉi tiu politiko de silento persistis dum jarcentoj, la rekono de la memoro pri sklaveco – difinita kiel la efikoj de la pasinteco sur la nuntempo – ekaperas iompostiome. Unu el la ĉefaj kialoj por tio estis ŝanĝiĝo de tutmondaj rilatoj ekde la fino de la Dua Mondmilito. Unuflanke, intelektuloj el la karibiaj kolonioj, kiel Aimé Césaire (Martiniko, Francio), aŭ el Afriko, kiel Alioune Diop (Senegalo), komencis denunci la eŭropcentrismon kaj kontraŭdirojn de Eŭropo konstruitajn surbaze de la nocio de "Libereco", dum sklaveco kaj kolonia subpremo persistis ĝis la Afrika sendependiĝo.

Aliflanke, ĉi tiu skuo de pensostrukturoj, kombinita kun la monstreco de la Ŝoaho (Holokaŭsto), stimulis intereson pri la travivitaj spertoj de atestantoj de historio. Anstataŭ fokusiĝi sur tutmondigado de historia diskurso, oni donas atenton al "atestantoj de historio". Kvankam estas malmultaj rektaj atestantoj de sklaveco en Karibio fine de la dudeka jarcento, ĝiaj heredaĵoj restas preskaŭ ĉie en la mondo. Tiel, nome de la principoj de universala egaleco, la memoro pri sklaveco fariĝis afero de publika intereso. La celo estis konsideri la historiajn faktorojn, kiuj klarigas kial neegalecaj sociaj rilatoj kaj pozicioj estas konservataj en nuntempaj socioj – ĉi tio estas la vojmapo por la memorado pri sklaveco.

Tiun vojmapon oni starigis sub la premo de civitanaj asocioj kaj registaraj politikoj impulsitaj de politikaj eventoj. La protestoj en Brazilo kaj Sud-Ameriko kontraŭ la festado de la "malkovro" de Ameriko, kaj la reago al murdado de afrikdevenuloj en Usono, estas ilustraĵoj de ĉi tiu movado.

Pardonpetoj kaj kompensoj

La memoro pri sklaveco tiel pravigis la starigon de la tiel nomataj memorigaj leĝoj, kiel tiuj alprenitaj en Francio en 2001 kaj en Senegalo en 2010, kiuj konsideras sklavecon kiel krimon kontraŭ la homaro. Kaj kvankam la Monda Konferenco kontraŭ Rasismo, okazinta en 2001 en Durbano (Sud-Afriko), malsukcesis venigi la registarojn en konsenton favore al pardonpeto, pluraj registaroj progresis →

pri la afero. En 2007, Britio pardonpetis pro sia rolo en la sklavnegoco, sekvota de Danio en 2017, Nederlando en 2022 kaj Portugalio en 2023. Eŭropo, siavice, pardonpetis pro la "neimagebla sufero trudita al milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj kiel rezulto de la transatlantika sklavnegoco".

Kiel parto de la ŝanĝiĝo okazinta en la ekvilibro de potencoj ekde la jaro 2000, oni enkondukis memordatojn dediĉitajn al la memoro pri sklaveco. Je internacia nivelo, la 25-a de marto fariĝis la Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de Sklaveco kaj la Transatlantika Sklavnegoco de Unuiĝintaj Nacioj, dum la 23-a de aŭgusto estas la Internacia Tago de UNESKO por la Memoro de Sklavnegoco kaj ĝia Abolicio, memore al la ribelo de sklavoj okazinta sur la insulo Sankta Domingo (nuna Haitio) en 1791.

Al ĉi tiu movado ankaŭ korelativas multaj naciaj iniciatoj, inkluzive de la Tago de Memorado de la Sklavnegoco, Sklaveco kaj ilia Forigo (Journée des Mémoires de la Traite, de l'Esclavage et de leurs Abolitions) dekretita la 10-an de majo en Francio. En Brazilo, oni elektis du memordatojn: la 13-an de majo, la tagon en kiu Princino Izabela abolis sklavecon (kvankam pli simbole ol efektive), kaj la 20-an de novembro, la Nacian Tagon de Nigrula Konscio, datrevenon de la morto de Zumbi dos Palmares, estro de la plej granda kilombo (portugala skribmaniero: *Quilombo*) en Brazilo.

Nederlando starigis la festadon de *keti-koti* ("rompitaj katenoj" en la surinama lingvo) ĉiun 1-an de julio por rememori la finon de sklaveco en Surinamo (iama Nederlanda Gujano) kaj la Nederlandaj Antiloj. En Jamajko, samkiel en Trinidado kaj Tobago kaj ĉiuj eksaj anglaj kolonioj, en la Tago de la Emancipiĝo, la 1-a de aŭgusto, estas festata la abolo de sklaveco samtempe kun la sendependiĝo de tiuj landoj. Maŭricio celebras la abolicion la 1-an de februaro en Pointe Canon.

Politika agnosko

Ĉiuj ĉi oficialaj eventoj konsistigas politikan agnoskon, sed tamen estas malfacile mezuri iliajn sociajn efikojn. Anstataŭ konsideri la memorojn konservitajn de la heredantoj de ĉi tiu historio, la memorfestado esprimas la politikan uzon faritan el la pasinteco.

Dum la 20-a jarcento, la deportado de afrikanoj al Ameriko, ilia sklavigo kaj la transportado de nigraj homoj trans Atlantikon evoluis en kreivan sperton ene de la "nigrula" diasporo. La memoro pri sklaveco transformiĝis en diskurson, bildojn kaj heredaĵon. Atestas tion la inkluzivigo en la Liston de la Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro de UNESKO de la malojaj kantoj el la insulo Reunio kaj la Mandén-Ĉarto (Malio), unu el la plej malnovaj konstitucioj en la mondo, inter aliaj.

Ankaŭ muzeoj kontribuis al ĉi tiu procezo. En Ganao, la muzeoj de Cape Coast kaj Elmina, iamaj fortikaĵoj rilataj al la sklavnegoco, aludas la sklavnegocan temon. En Senegalo, la Domo de Sklavoj sur la insulo Gorée fariĝis loko de pilgrimado kaj internacia simbolo de konsciiĝo pri la abomenaĵoj suferitaj de afrikanoj dum la eŭropa sklavnegoco, dum la Muzeo de Nigrulaj Civilizoj en Dakaro prezentas Afrikon el pli tutmondeca perspektivo.

La mesaĝo sendita de ĉiuj ĉi tiuj afrikaj lokoj estas senhezite orientita eksteren, precipe al la diasporoj. La Nacia Muzeo de Afrik-Usona Historio kaj Kulturo en Vaŝingtono D.C. (Usono), aliflanke, celas rekoni la gravecon de afrikdevenaj usonanoj en la konstruado de la usona nacio. La celo estas reskribi la historion de la lando per elstarigado de ilia kontribuo pere de sklaveco. En Eŭropo, la Internacia Muzeo pri Sklaveco en Liverpolo (Britio) estis la unua inaŭgurita por trakti la temon.

Postuloj pri justeco

Tamen, kiel substrekis kelkaj asocioj de homoj konservantaj la memoron pri sklaveco, la ĉefaj memorigejoj estis organizitaj ĉirkaŭ la abolo de sklaveco,

La programo Vojoj de Sklavigitaj Homoj 30-jariĝas

En 2024, la UNESKO-Programo pri la Vojoj de Sklavigitaj Homoj: Rezisto, Libereco kaj Heredaĵo festas sian 30-an datrevenon. Lanĉita en 1994, la programo rekonas la tragikan historion de sklaveco kaj ĝian influon sur la moderna mondo, subtenante iniciatojn pri la temo de sklaveco, rezisto al ĝi, kaj ĝia abolo.

Nuntempe la programo ankaŭ reliefigas la kontribuojn de afrik-devenaj homoj same kiel la pezan influon de ĉi tiu heredaĵo sur sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj malegalecoj. Landoj siaflanke povas proponi lokojn por esti aldonitaj al la Reto de Lokoj de Historio kaj Memoro ligitaj al Sklavigo kaj Sklavnegoco de UNESKO kaj tiel havi aliron al la teknika subteno kaj defendo de UNESKO por la sociekonomia profito de lokaj loĝantaroj. Krome, oni impulsas ĝemeligon de afrikaj urboj kun iliaj diasporoj por faciligi kaj plifortigi kunlaboron en la kampoj de esplorado kaj trejnado.

Por festi la datrevenon, UNESKO kunlabore kun membroj kaj eksteraj partneroj organizas aktivecojn dum la tuta jaro por mobilizi komunumojn kaj kunigi elstarajn sciencistojn, intelektulojn, artistojn kaj anojn de la civila socio por instigi al pripensado pri la heredaĵo de sklavigo. Ili inkludas la surmapigon de la vojoj de sklavigo en Kenjo, la prezentadon de la libro *La sklavaj nigruloj* (Los negros esclavos) de Fernando Ortiz en Kubo kaj la okazigon de ekspozicio sub la titolo *Ayiti, Virinoj, Voduismo kaj Revolucio* (Ayiti, Femmes, Vodou, Révolution) en la ĉefsidejo de UNESKO.

La arkivoj de la programo estas ankaŭ publike haveblaj.



© Christian Bonzom

◥ Deportado *(2007), pentraĵo de la franca artisto Christian Bonzom, el la serio* Ĉe la ombro de la lumoj *(A l' ombre des Lumieres)*.

kiel la Arko de la Reveno en Novjorko, aŭ la Monumento pri la Abolo en Nanto (Francio) aŭ la Nacia Monumento al Sklaveco en la Orienta Parko (Oosterpark) de Amsterdamo. La suferoj kaj la maljusteco kaŭzitaj de la historio de sklaveco ofte ne estas konsiderataj. La Interkontinenta Muzeo pri Sklaveco en Portluiso en Maŭricio, malfermita en 2023, celas, male, prezenti la sortojn de sklavigitaj homoj.

Kaj tie kuŝas la problemo. Publikaj politikoj en siaj simbolaj, leĝdonaj kaj edukaj formoj helpas, sed ne solvas la problemojn de rasismo kaj diskriminacio. Ili ne respondas al postuloj pri justeco kaj egaleco, kaj male, ili estigas postulojn pri kompensoj, ĉar demandoj pri la efikeco de la "fino de sklaveco" daŭre estas urĝaj.

En septembro 2013, sub la aŭspicio de CARICOM (Kariba Komunumo), la karibaj ŝtatoj, kun Haitio, lanĉis kampanjon celantan Danion, Francion, Nederlandon, Norvegion, Portugalion, Hispanion, Svedion kaj Brition. Ili procesis kontraŭ la menciitaj Eŭropaj landoj, postulante kompenson pro la damaĝo kaŭzita de sklaveco kaj koloniado. En Usono, ĉi tiu postulo reaperis radikale dum la rasaj konfliktoj en Ferguson inter 2014-2015 kaj Charlottesville en 2017, reaktivigante la movadon Black Lives Matter (Nigrulaj Vivoj Gravas), kiu komenciĝis en 2012.

Justeco (en la etika kaj jura sencoj) kaj egaleca traktado, kiuj konsistigas la principojn de la postuloj, estis metitaj en perspektivon kun tutmonda postulo pri kompenso. La respondoj estis diversaj. En Nederlando, la registaro decidis starigi fonduson de 200 milionoj da eŭroj por trakti la nuntempajn efikojn de sklaveco. En Usono, privataj organizoj kiel *Chase Manhattan Bank* kaj la universitatoj Harvardo, Kolumbio kaj Howard, inter aliaj, elektis financi specifajn studstipendiojn por afrikdevenaj homoj.

> **"Publikaj politikoj en siaj simbolaj formoj ne respondas al postuloj pri justeco kaj egaleco**

En 2020, Eŭropa Unio alvokis al alpreno de naciaj planoj por konsideri la kolonian pasintecon kaj batali kontraŭ la struktura rasismo. Ŝanĝi la manieron kiel historio estas registrita en publikaj spacoj, tio ankaŭ estas aspekto de kompenso. Ŝanĝi la nomojn de stratoj alnomitaj laŭ sklavnegocistoj kaj forigi statuojn reprezentantajn sklavistojn estas rimedoj por ŝanĝi la manieron kiel historio estas verkita. Kompensoj, en ĉiuj multoblaj sencoj de la termino, helpas restarigi justecon por pli egaleca mondo. ■

-El la angla esperantigis Pablo León (Argentino)

Karibio postulas kompenson

La violento kaŭzita en la kunteksto de sklavismo lasis profundajn kaj multoblajn cikatrojn tra la tuta regiono. Pli kaj pli da voĉoj postulas riparojn, inkluzive de financa kompenso.

Verene Shepard

Socia historiisto kaj direktoro de la Centro por Kompenso-esplorado ĉe la Universitato de Okcidentaj Indioj, Kingstono, Jamajko.

La suferado de tiuj afrikanoj, kiuj estis kaptitaj, transportitaj trans la oceanon kaj sklavigitaj en Ameriko, samkiel tiu de la indiĝenoj, kiuj ankaŭ suferis sub la barbara koloniismo, estas bone konata. Malpli konataj estas la daŭraj financaj implicoj de tio, kaj por la sklavigaj socioj, kaj por la sklavoj kaj iliaj posteuloj.

Pli kaj pli ofte, oni postulas de registaroj kaj institucioj, kiuj profitis de konkerado, sklavigado kaj koloniado, ke ili agnosku la rolon de ili ludita en tiuj sistemoj kaj efektivigu taŭgan kompensadon. Ĉi tiu postulo kreskas pli kaj pli en la Tutmonda Sudo, kiu inkluzivas Afrikon, Latinamerikon, Karibion, kaj partojn de Azio kaj Oceanio.

La ĉefa postulo estas ke tiuj entoj agnosku, ke ilia riĉeco rezultas de la detruado de sennombraj rasaj kaj etnaj komunumoj, kulturoj kaj socioj, kies sekvo ankoraŭ nuntempe malhelpas ilian prosperon. Tion jam montris la Sankta-Lucia ekonomikisto kaj Nobel-laŭreato Arthur Lewis, aŭtoro de *Laboro en Okcidentaj Indioj* en 1939; la historiisto kaj unua ĉefministro de Trinidado kaj Tobago Eric Williams, kiu skribis *Kapitalismo kaj Sklaveco* en 1944; kaj la barbadosana ekonomika historiisto Hilary Beckles (vidu paĝon 11 en ĉi tiu eldono).



© Sasha Huber kaj Tamara Lanier. Originalaj bildoj danke al la Muzeo pri Arkeologio kaj Etnologio Peabody, Universitato Harvardo (Renty, 35-5-10/53037; Delia, 35-5-10/53040)

> **Pluraj institucioj rekonis sian pasintecon kaj instigis komplicajn landojn alfronti la heredaĵon de sklaveco**

Delongaj malagnoskoj

Tiuj klarigoj pri la bezono de kompensoj kontraŭas multajn antikvajn malagnoskojn, kiel tiu de la usona historiisto Seymour Drescher, kiu argumentis, ke la brita abolicio de la "sklava negoco" en 1807 rezultis de la mobilizado de la brita popolo kontraŭ ĝi, ne de la malkresko de ekonomia graveco de sklaveco por Britio.

Eĉ antaŭ Williams kaj Beckles, la ekonomikisto Arthur Lewis, fama pro siaj rekomendoj por la industriigo de Okcidentaj Indioj, estis pasia subtenanto de kompensado pri koloniismaj misfaroj. Li atentigis Brition, ke la preskaŭ 200 jaroj da senpaga laboro, kiun ĝi eltiris el sklavigitaj homoj en Karibio, estas ŝuldo, kiu devas esti repagita.

Kompreneble, en Karibio la postulo pri kompenso por la genocido de indiĝenaj popoloj, la transportado kaj sklavigado de afrikanoj, la trompa kontraktado de azianoj kaj maljustaĵoj faritaj en post-sklaviga kaj post-kolonia epokoj, estis la ĉefa temo de eŭrop-karibaj juro kaj historio dum pli ol du jarcentoj. La pioniroj estis sklavigitaj afrikanoj, kiuj sciis, ke ilia kontraŭleĝa sklavigo estis malobservo de iliaj homaj rajtoj, kaj luktis por ĉesigi la transatlantikan transportadon de sklavigitoj.

Serĉado de justeco

En la post-sklaviga periodo, emancipitaj homoj alprenis la lukton, strebante por akiri terpecon kaj taŭgajn salajrojn. En la 18-a kaj 19-a jarcentoj estis militoj ĉie en Karibio; la enlanda milito por Morant-Golfeto en Jamajko en 1865 kaj la laboristaj protestoj tra Karibio en la 1930-aj jaroj, ĉiuj daŭrigis ĉi tiun serĉadon de justa kompenso. Kvankam la regantaj klasoj klopodis por konservi sklavecon, tamen la homamaso rifuzis kunlabori.

La membroj de rastafaria movado daŭrigis la movadon por kompensado, en la kunteksto de repatriigo al Afriko, kaj poste la civila socio, sciencistoj, individuaj politikistoj kaj, ekde 2013, la registaroj de la kariba regiono, aliĝis al ili. La unua politikisto, kiu faris tion, estis la forpasinta ambasadoro Dudley Thompson, kiu estis ĉefrolulo en la Abuĝa Kompenso-Konferenco de 1993, en Niĝerio, kiun ankaŭ partoprenis Ĉefo Abiola, sukcesa niĝeria negocisto, kiu strebis meti kompensaĵojn sur la internacian diplomatian agendon, kaj Lordo Anthony Gifford, advokato pri homaj rajtoj en Britio kaj Ĵamajko, kiu luktas por rajtoj de karibianoj.

Nuntempe, pluraj institucioj rekonis sian pasintecon kaj instigis komplicajn landojn alfronti la heredaĵon de sklaveco kaj koloniismo, kaj kompensi centjarojn



◤ Tajlori Liberecon – Renty kaj Delia, *2021, de Sasha Huber. La svis-haitia artisto uzas vinktojn por "vesti" la dagerotipojn de Renty kaj lia filino Delia, kiuj estas senvestaj.*

da perforto kaj diskriminacio per kompensaĵoj, surbaze de la Durbana Deklaracio kaj Agadplano kaj sur la Aktivecplano por la Internacia Jardeko por Homoj de Afrika Deveno (2014-2024).

Kreskanta subteno

Inter la subtenantoj de kompensoj estas universitatoj, inkluzive de Princetono en Usono kaj Kembriĝo en Britio, kaj ankaŭ lernejoj establitaj de sklavigistoj, kiel Munro en Jamajko. Aliaj institucioj subtenantaj kompensojn estas la Anglikana Eklezio; mekanismoj kaj traktato-organismoj de Unuiĝintaj Nacioj; asekur-kompanioj kaj posteuloj de sklavigistoj. Tiuj lastaj, sub la gvido de Laura Trevelyan, iama ĵurnalisto de BBC, starigis grupon nomitan "La Heredantoj de Sklavigistoj".

Kreska subteno al financaj kompensoj kaj la usona konsila firmao *Brattle Group* liveris specifajn ciferojn pri tio. Laŭ ilia raporto, la tuta sumo ŝuldata de antaŭaj

> **La bezono de financaj kompensoj ricevas kreskantan subtenon**

sklavigaj ŝtatoj al 31 landoj en Ameriko estas 107.8 bilionoj da usonaj dolaroj. Laŭ tiu kalkulo, Britio devus pagi proksimume 24 bilionojn al 14 landoj de la Karibia Komunumo (CARICOM) kaj 9.5 bilionojn al Jamajko. Usono devus pagi 26.79 bilionojn pro transatlantika transportado de sklavoj al Usono; kaj Francio, 9.288 bilionojn al Martiniko, Franca Gujano, Gvadelupo kaj Grenado, kaj 1.4 miliardojn al Haitio. Estas postuloj ankaŭ koncerne al Hispanio, Brazilo, Portugalio kaj Nederlando.

Oni kalkulas la pagotan kompensan sumon por la post-sklaviga periodo je 22.9 bilionoj da usonaj dolaroj, kio metas la totalan sumon je pli ol 130 bilionoj.

Rekonstrui la historion de Afriko

En 1964 UNESKO lanĉis grandan projekton por studi la Ĝeneralan Historion de Afriko, celante restaŭri la ĝeneralan malklerecon pri la afrika pasinteco. Senparalele en sia ambicio, la projekto konsistas el la prezentado de la historio de la kontinento el afrika perspektivo, liberigante ĝin de rasaj antaŭjuĝoj rezultantaj el sklava negoco kaj koloniado. La origina kolekto de ok ilustritaj volumoj pritraktas la historion de la kontinento ekde la unua apero de homoj ĝis la fino de la 20-a jarcento. Tio postulis 35 jarojn da kunlaboro inter pli ol 230 historiistoj kaj aliaj spertuloj el Afriko kaj aliaj kontinentoj por kompletigi la verkon.

Ekde 2020, tri pliaj volumoj estas planataj por ĝisdatigi la kolekton pri lastatempaj sociaj, politiko-sciencaj kaj arkeologiaj disvolvoj, por analizi afrikajn diasporojn (Volumo n.10 pri diasporoj estis eldonita en 2023). Ĉi tio estas parto de la dua stadio de la projekto Ĝenerala Historio de Afriko de UNESKO, lanĉita en 2009, kiu celas uzi la kolekton por renovigi la edukadon pri historio en Afriko, kaj por firmigi la ligojn inter afrikaj popoloj, tiel kreskigante regionan integriĝon kaj pacon.

Ĝis justeco estos farita

Krom tio, CARICOM, grupo de dudek landoj de Bahamoj en la nordo ĝis Surinamo kaj Gujano en Sudameriko, proponis Planon por Kompensado. La registarestroj de tiuj landoj, la Centro por Kompensa Esplorado ĉe la Universitato de Okcidentaj Indioj, kaj Naciaj Kompensaj Komitatoj tra Karibio starigis Kompensan Komisionon. La Dek-Punkta Plano pritraktas formalan pardonpeton, forigon de analfabeteco, la agnoskon de la valoro de afrikaj scioj kaj ŝuldo-nuligon, inter aliaj aferoj.

> **La movado por ripara justeco daŭre kreskos ĝis kompenso estos liverita**

Kia ajn la metodo, la movado por ripara justeco daŭre kreskos, ĝis kompenso estos liverita al ĉiuj homoj lezitaj de sklavigo kaj blankula superregemo, kiel esprimite tra koloniismo kaj manifestite en ĝiaj nuntempaj heredaĵoj.

Finfine, kiel deklaris en 1964 Siro Ellis Clarke, la reprezentanto de la trinidada registaro ĉe Unuiĝintaj Nacioj en la Komitato pri Koloniismo: "Administra potenco... ne rajtas eltiri dum jarcentoj ĉion, kio povas esti elprenita el kolonio, kaj tio estas farita, nur liberigi sin por devoj de la administrantoj... Justeco postulas, ke riparado estu farita al la lando, kiu suferis la ruinigojn de koloniismo..." ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

Hilary McD. Beckles

Profesoro pri Ekonomia kaj Socia Historio, vickanceliero de la Universitato de Okcidentaj Indioj, Kingstono, Jamajko

Sklav-negoco kaj virinoj: forgesita historio

Ek de la 18-a jarcento virinoj konstante okupis la demografian plej multonen koloniaj plantejoj. La sklavismo serioze dependas de la laborado kaj naskipovo de la nigraj virinoj. Tamen, en la historia esplorado dum longa tempo ili estis en marĝena loko.



© George Grantham Bain Collection / Library of Congress Prints and Photographs Division

Ventomuelejo de sukerkano en Barbado, inter 1915 kaj 1920.

Antaŭ tridek kvin jaroj mi publikigis monografion titolitan *Naturaj Ribeluloj: Socia historio de nigraj sklavigitaj virinoj en Barbado*. La origino de la teksto estis studenta ribelo okazinta en historia seminario en la Universitato de Okcidentaj Indioj. Inaj studentoj protestis en la klasĉambro, ke miaj prezentoj nesufiĉe temas pri la sklavigitaj virinoj, kiuj estis la demografia plimulto en la kolonio dum la plej granda parto de la sklavperiodo. Tiam mi promesis enfosi pli profunde la arkivojn kun intenco korekti la situacion, kio fariĝis ia pedagogia kompenso.

La libro estis la unua el sia klaso kaj revoluciis la historiografion de sklavigo en karibaj landoj. La movo al seksa justeco en historia diskurso estis pioniro. Ekde tiam ni havas eksplodon de esploroj kaj publikaĵoj pri la spertoj de sklavigitaj virinoj. La literatura produktado estas grandega kaj transpasas la sciencan enhavon de la programoj de historio. Ĝi nun estas la empiria bazo de publika pledado pri la temo de kompensoj por sklaveco. Plian fojon, mi trovis min pelita de studentoj al la avangardo de diskursa movado.

Ne ĉiuj miaj aktivulaj studentoj estis feministoj, sed ĉiuj bezonis scii la kialon de ĉi tiu historiografa silento – malpleno, fakte – ĉirkaŭ kiu klare devus esti la deirpunkto por la esplorado. Iuj ankaŭ volis scii ĉu mi estas heredonto de la antaŭjuĝoj de antaŭaj generacioj de esploristoj kaj ĉu mi kontraŭstaris ĉi tiujn argumentojn. Post unu jaro da elĉerpaj esploroj en la karibaj arkivoj, mi denove mergis mian menson, nun multe pli scivoleman, en la dokumentojn de la brita imperio.

La vekiĝo

La "malkovro" en Londono estiĝis je la maniero de Kristoforo Kolumbo. La faktoj de ĉiam estis tie atendante ke iu perdita aventuristo parolu pri ilia malkovro. Jen kion mi eltrovis: en la datumoj pri sklaveco en plantejo estas pli da referencoj al la spertoj de sklavigitaj virinoj ol tiuj de sklavigitaj viroj. Kial do la laboro de historiistoj ne reflektis tion dum jarcento da verkado pri sklaveco? La respondo ŝajnis sufiĉe simpla; la vira pensmaniero serĉis proprajn vidpunktojn prefere ol objektivan seksan analizon.

La respondo ŝajnis sufiĉe simpla: la vira menso ne favoris objektivan analizon

de sekso. Necesas profunde studi la demografiajn datumojn. La sklavistoj preferis uzi ĉefe viran laboron nur en la preparaj fazoj de infrastrukturkonstruado. Post kiam la arboj estis elradikigitaj kaj la fosaĵoj fositaj, ili konsideris ke virinoj estas pli produktivaj kaj efikaj en konservado de la plantejoj.

En la mezo de la 18-a jarcento, estas ĉefa amaso en la loĝantaro de angl-karibaj virinoj. Barbado estis la unua. De la 1730-aj jaroj ĝis la abolo de sklaveco en 1830, nigrulinoj pli multis ol nigruloj. Tio reprezentis ekzistecan vekiĝon por miaj lernantoj, kiuj bezonis rakonton por klarigi kial ĉi tiu realo ne estas reflektita en la nuna historiografio.

> **La kolonia sistemo akiris pli da riĉaĵo kaj servoj de sklavigitaj nigrulinoj ol de iliaj viraj ekvivalentoj**

Lavistinoj, kudristinoj kaj servistinoj

En la grandaj koloniaj urboj sklavinoj plenumis la plejparton de la laboro. Ili estis lavistinoj, kudristinoj, kuiristinoj, servistinoj, prostituitinoj kaj stratvendistoj. Iliaj mastroj "luis" ilin kaj la virinoj devis doni al ili la monon, kiun ili gajnis. Kun tia larĝa gamo de taskoj, nek grandurboj nek plantejoj povis pluvivi kaj prosperi sen iliaj servoj. Ili ankaŭ reprezentis ekonomian sektoron, kiu ebligis al blankaj virinoj prizorgi siajn proprajn entreprenojn. La plimulto de urbaj sklavoj estis posedataj de blankaj virinoj, kies entreprenado en la kampara plantejsektoro, kontraste, estis malplimulta.

Kio okazis en la britaj kolonioj, estis simile al tio, kio okazis en la francaj kaj nederlandaj teritorioj. En ĉiuj lokoj, la sklava sistemo estis konstruita sur la jura premiso ke nur sklavino povus naski sklavigatan infanon. La nigrulino estis, tiel, biologia kaj leĝa portanto de moveblaĵoj. Ŝi estis samtempe la ĉefa fonto de produktiva laboro kaj ĝia reproduktilo. Ŝia infano, generita de nigra aŭ blanka masklo, estis kalkulita sur la negoca ĉeflibro kiel valoraĵo. Ŝi estis do konsiderata "perfekta posedaĵo": ŝi estis fonto de laborforto, reproduktis sin kaj provizis soci-seksajn plezurojn laŭ la volo de ŝia posedanto. La negoca modelo de sklaveco, tial, estis bazita jure, ekonomie kaj socie sur la sklavigitaj nigrulinoj kiel valoraĵo.

En la koro de sklava entrepreno

En ĉi tiu kunteksto, la troekspluatataj nigraj sklavinoj estis en la koro de la sklavecbazita entrepreno. La kolonia sistemo ĉerpis pli da riĉeco kaj servoj de ili ol de iliaj viraj ekvivalentoj. Ili estis la ĉefa fonto de la daŭropovo de sklaveco. Iliaj fekundeco kaj patrineco, samkiel iliaj brakoj kaj kruroj en la kampo, estis kombinataj por krei la "supersklavon" en la menso de sklavistoj.

Tamen, estis ĝuste pro la provo administri kaj manipuli ilian fekundecon, ke la sistemo konvertis ilin en "naturan ribelulon", intencantan protekti propran internan mondon. La ripara justeca movado estas konstruita surbaze de la premiso, ke sklavigo, kiel krimo kontraŭ la homeco, devus esti bazita sur la aserto ke ne estas egaleco inter la sklavuloj. Virinoj portis la pli grandan parton de la ŝarĝo kaj ajna koncepto de kompenso devus komenciĝi kaj finiĝi per tiu kompreno.

La kompensmovado de CARICOM (Kariba Komunumo) ekkonsentis kun ĉi tiu vero en sia pledado kaj metodaro pri monkalkulado. La konverĝo de historia esplorado kaj publika diskurso ĉi-rilate reprezentas gravan renversiĝopunkton en tio kio ĝis nun estis masklo-centrita rakonto. Grandaj movadoj komenciĝas el malgrandaj demandoj en cetere trankvilaj spacoj. Fakuloj havas la respondecon transcendi vokojn el klasĉambroj kaj serĉi mondskuajn solvojn al tia enketo. De prigenra rezonado al konversacio pri kompensoj, virinoj en serĉado pri verodaŭre sin premas kontraŭ la historiaj muroj de la vira sciaro. Precipe, ili batalas por ke ilia vidpunkto havu lokon. ■

-El la angla esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)

Riĉa nemateria heredaĵo

La tradicio de la dancodramo *Cocolo* estas evoluigita inter la posteuloj de sklavoj el la Brita Karibio venigitaj al Dominika Respubliko meze de la 19a jarcento por labori en la sukerkanplantejoj. Ĉi tiu komunumo, lingve kaj kulture distinga, fondis siajn proprajn preĝejojn, lernejojn, bonfarajn societojn kaj interhelpajn servojn. La dancodrama tradicio, unu el la plej karakterizaj esprimoj de la kulturo de la komunumo, estis enskribita en 2008 sur la Reprezenta Listo de la Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro, de UNESKO. Ankaŭ aliaj kulturaj esprimoj ligitaj al la memoro de la posteuloj de sklavigitaj homoj estas inkluditaj en la Listo, kiel ekzemple la Sambo de Roda de la Recôncavo de Bahio (Brazilo), la Karnavalo de Barankilo (Kolombio), la heredaĵo de forkurintaj nigruloj de Moore Town (Jamajko) kaj maloya (Reunio).

Frédérique Doyon

Kultura ĵurnalisto kaj gastkuratoro ĉe Agora de la danse *(Montrealo, Kanado)*

Rhodnie Désir, dancanta la pasintecon

En Bow't, Rhodnie Désir, koregrafo de Kebekio, miksas tradician dancon kun nuntempaj influoj por rakonti la historion de elmigrintaj sklavoj. Ĉi tiu intima soloo estis riĉigita kaj transformita per esplorado en la ritmaj kulturoj de afrik-devenaj homoj, kio kondukis ŝin de Meksiko ĝis Usono tra Haitio kaj Brazilo.

Ni kaptas Rhodnie Désir dum ŝi stiras sian aŭton inter la urbocentro de Montrealo kaj sia hejmo en Laurentians, verda regiono ĉe la norda bordo de la rivero Sankta Laŭrenco. Ĉi tiu ĉiutaga veturado iĝis ŝia vivstilo, ŝia oksigeno. "Veturi estas mensa liberiĝo por mi," diras la juna virino el Kebekio. "Ĝi faras al mi bonon. Ideoj ofte venas, kiam mi estas malantaŭ la stirrado."

Vojaĝado tien kaj reen, devas esti dirite, formis la biografion de Désir ekde la komenco. Ŝi naskiĝis al haitiaj gepatroj kelkajn jarojn post kiam ili translokiĝis al Kebekio. Iĝinte koregrafo, ŝi trairis kontinentojn, sekvante la paŝojn de devigitaj migradoj de afrik-amerika sklavaro – motivo, kiu nutris ŝian plurflankan evoluantan laboron.

Désir nun estas ĉie estimata - ŝi estis la unua kiu ricevis la titolon de helpartisto ĉe Place des Arts, la plej granda arta kaj kultura komplekso de Kanado - sed la vojo al rekono estis longa. Antaŭ dek jaroj, Désir ankoraŭ luktis por akiri aliron al instituciaj prezentejoj, kiuj ne estis tre akceptemaj al ŝia moderne afrik-stila koregrafia lingvo.



©Kevin Calixte

◥ *Sceno de la spektaklo* Bow't Trail Rétrospek*, la plej nova versio de la verko* Bow't*, por kiu la koregrafo Rhodnie Désir travojaĝis plurajn landojn serĉante la ritmojn de la afrikaj popoloj, kiuj estis deportitaj tien.*

Miskompreno

Dum ŝia laboro nun estas famkonata – precipe ĉe Unesko, kie ĝi estis prezentita en 2015 kiel parto de la Sklavovoja Programo (renomita en 2022 kiel Itineroj de Sklavigitaj Popoloj) – ĝin trafis komence nekompreno. En 2013, spektantaroj estis konsternitaj pro ŝia kreaĵo *Bow't*, soloo en kiu ŝia korpo disvolviĝas al haitiaj ritmoj, esprimante la universalecon de ekzilo, migrado kaj deportado.

"Oni diris al mi, ke ĝi estas tradicia verko; neniu komprenis ĝian nuntempan dimension," ŝi klarigas. "Do mi faris al mi multajn demandojn, kaj tiel mi rekreis ĉi tiun pecon en la diversaj landoj, kie estis ekzilitaj popoloj afrik-devenaj."

De 2015 ĝis 2021, ŝi ekserĉis ritmojn por esti dancataj, kantataj kaj tamburataj. Ŝia vojaĝo kondukis ŝin de Brazilo al Haitio, tra Kanado, Usono, Martiniko →

kaj Meksiko. Ĉe ĉiu halto, ŝi donis al si monaton por malkovri la landon, renkonti muzikistojn, historiistojn kaj sociologojn, kaj rekrei novan version de sia inaŭgura *Bow't-soloo*.

Per tiuj vojaĝoj kaj renkontoj, ŝia kreaĵo estis riĉigita kaj transformita, iĝante *Bow't Trail*. En la procezo, ŝi malkovris kreivan metodon - dokumentan koregrafion.

> **“Kiam vi kunigas ĉiujn ritmajn lumojn en la mondo, grandega lanterno lumas**

Dokumentante ritmojn kaj igante ilin propraj, Désir utiligas kreadon kiel ilon de malkoloniado.

“Mi religiĝis al certaj radikaj tamburaj kaj kantaj ritmoj kaj mi kreis kun loka muzikisto sen dikti ion ajn al li, ĉar li estas tiu, kiu posedas la scion.” Dokumentante ritmojn kaj igante ilin propraj, Désir utiligas kreadon kiel ilon de malkoloniado, plenigante la mankantajn paĝojn de historiaj rakontoj.

Kaŝitaj mesaĝoj

“Kion mi amas pri afrik-devenaj kaj praulaj ritmaj kulturoj, tio estas la nocio de la masko,” ŝi klarigas. “La prapatroj konscie kaj nekonscie sukcesis kaŝi mesaĝojn en siaj ritmoj, dancoj kaj gestoj, mesaĝojn kiuj povas esti retrovitaj kaj reinterpretitaj hodiaŭ.”

Ekzemple, en Rio-de-Ĵanejro, Désir preparis la brazilan version de *Bow't* por la franclingva kultura programo de la Olimpikoj de 2016. “Kun kameruna kantisto kaj saksofonisto Manu Dibango, ni devis reprezenti afrik-devenan kulturon en Brazilo.” Timiga defio. Ŝi estis en kulturcentro konstruita super la spuroj de iama tombejo por nigraj sklavoj, en la regiono kie sambo naskiĝis, kiam ŝi antaŭvidis la prezentaĵon. “Mi ne povus prezenti soloverkon en kunteksto kie po unu juna nigrulo de ladurbo mortas ĉiun 23an minuton.”

Kiam ŝi malkovris *passinho*, improvizitan dancon faritan nudpiede en la slumoj de norda Rio-de-Ĵanejro, Désir komprenis, ke ŝi devus kapti ĝin kaj aldoni ĝin al sia kreaĵo. “La junuloj de ladurboj devis havi sian lokon,” ŝi memoras. “Sekve, la laboro iĝis amplifilo por ilia voĉo, alprenante eĉ pli da signifo.”

Kandombleo, jorubo kaj voduo

Dum ŝiaj vojaĝoj, komunumo de spirito kuranta tra afrik-devenaj kulturoj formiĝis. “Estas interkovroj esprimitaj en malsamaj ritmoj, ĉu temas pri brazila kandombleo, kuba jorubo aŭ haitia voduo. Sendepende de landlimoj, kiam vi kunigas ĉiujn ritmajn lumojn en la mondo, grandega lanterno lumas.”

Kvin horoj da filmo ankaŭ aperis el tiuj vojaĝoj, ne nur montrante ĝian kreivan laboron, sed ankaŭ dokumentante la ĉiutagan vivon de la homoj en ĉiu lando, kiun ŝi vizitis, iliajn luktojn kaj la manierojn kiel afrik-devenaj komunumoj adaptiĝis post sia elradikiĝo.

Kvankam okupita de aliaj koregrafioj, inkluzive de *Symphonie de coeurs*, nova kreaĵo bazita sur atestoj de kuracistoj kaj kormalsanuloj, ŝi ne finis *Bow't Trail*. La aventuro daŭros per reveno al la fonto en Afriko, kie ĉio komenciĝis. ■

-El la angla esperantigis Luigia Oberraich Madella (Italio)

Resaniĝo el generacia traŭmato

Kiel ni povas venki la generacian traŭmaton hereditan de la transatlantika sklavnegoco? La raporto *Kuraci la Vundojn de Sklavnegoco kaj Sklaveco*, publikigita en 2021, prezentas serion da rekomendoj. En la lastaj jaroj, esplorado montris, ke ne nur traŭmata strecho povas modifi konduton, ekkonon kaj psikan funkciadon, sed ankaŭ la efikoj povas esti transdonitaj al postaj generacioj. Ĉi tio povas okazi eĉ kiam individuoj ne estas elmontritaj al iu nova traŭmato; evento, kiun oni ne rekte spertis, povas havi psikajn kaj sociajn efikojn al homa vivo.

En *Kuraci la Vundojn de la Sklavnegoco kaj Sklaveco*, la vido estas, ke la fundamenta karakterizaĵo de sklaveco estas malhumanigo, kaj la verkintoj identigas manierojn helpi al nunaj generacioj resaniĝi de malsamaj aspektoj de tiu profunda traŭmato.

Resanigaj praktikoj estas centritaj ĉirkaŭ memorado kaj rememorigo; rekonekto al homa digno kaj restarigo de sento de tuteco. Por plu antaŭenigi ĝin, resanigo de rilatoj kaj kreskigado de repaciĝo estas konstruitaj per kreado de sekuraj spacoj, respektema aŭskultado kaj profunda dialogo.

La raporto desegnas la ĉefajn alirojn kaj praktikojn por venki la heredaĵon de la transatlantika sklavnegoco kaj sklaveco, surbaze de enigo de fakuloj kaj esploristoj. Ĝi estis evoluigita de internacia teamo kunlaboranta sub la programo Itineroj de Sklavaj Popoloj de UNESKO kaj la Tutmonda Esplorinstituto Homara por Paco.

Gorée, insulo de memoro

Clémence Cluzel

Ĵurnalisto en Dakaro, Senegalo



© Nicola Lo Calzo

Turistoj sur pramŝipo al la insulo Gorée (Senegalo).

Simbolo de la tragedio kaŭzita de la transatlantika sklavnegoco, la senegala insulo Gorée fariĝis la ĉefa destino por memor-turismo, altirante dekmilojn da vizitantoj ĉiujare, inkluzive de multaj afrikdevenaj personoj el eksterlando.

Ĉe la piedo de la distingaj duoblaj ŝtuparoj en la korto de la Domo de Sklavoj en Gorée, gvidisto klarigas la historion de ĉi tiu konstruaĵo de la fino de la 18-a jarcento, uzata precipe kiel deponejo por sklavoj antaŭ ilia deviga enŝipigo al Ameriko. Fronte al li, ĉirkaŭ 15 vizitantoj aŭskultas en silento dum aliaj esploras la ĉelojn kie virinoj, viroj kaj infanoj restis kiel kaptitoj. “Mi estas ŝokita pri kiel malgrandaj kaj malhelaj estas la ĉambroj en kiuj la sklavoj estis amasigitaj. Doloras mia koro kiam mi vidas la kondiĉojn truditajn al niaj prapatroj,” komentas Mohamed, 14-jara senegala lernanto, vizitante la lokon kun sia klaso kiel parto de lerneja ekskurso.

Sur la teretaĝo, ĉe la fino de longa, malluma koridoro, la “Pordo de Ne-Reveno” malfermiĝas rekte al la maro, en la preciza punkto kie la sklavoj estis prenitaj por la transiro al la Okcidentaj lindioj, Brazilo, Kubo, Usono aŭ Haitio, inter aliaj lokoj. Ĉi tio estas unu el la plej intensaj momentoj de la vizito. Dum kelkaj homoj fotas sin antaŭ ĉi tiu emblema loko, aliaj estas tro forte impresitaj de la emocioj kiujn ĝi vekas.

Olima, 21-jara afrikdevena usona studento pri antropologio, finas sian viziton kun larmoj en la okuloj. “Tre intense,” ŝi diras. Ŝia amikino Gabrielle, muzikisto el la ŝtato Virginio (Usono), unuafoje vizitas Afrikon. “Estas mia respondeco agnoski kaj alfronti la rektan aŭ nerektan rolon kiun miaj blankaj prapatroj ludis en ĉi tiu negoco kaj kompreni la historion de sklaveco,” ŝi klarigas.

Tutmonda agnosko

Malpli ol kvar kilometrojn for de la marbordo de Dakaro, la Insulo Gorée fariĝis la emblemo de la transatlantika sklavnegoco. La Domo de Sklavoj estas la plej ofte vizitata loko en Senegalo, ricevante plurajn centojn da vizitantoj ĉiutage.

Ĉi tiu tutmonda agnosko ŝuldiĝas plejparte al la unua konservanto de la loko, Boubacar Joseph Ndiaye, kiu senlace klopodis kreskigi la konscion pri la historio de Gorée, eĉ se la centra rolo de la insulo en la historio de la transatlantika sklavnegoco nun estas pridisputata. Ekde sendependeco, la senegalaj aŭtoritatoj disvolvis planon por konservi kaj antaŭenigi la insulon kiel publikan lokon de rememoro.

La enskribo de la Insulo Gorée en la Listo de Monda Heredaĵo de UNESKO en 1978 markis turnopunkton. Laŭ la priskribo de la loko, "por la universala konscio, ĉi tiu 'memorinsulo' estas la simbolo de la sklavnegoco kun sia sekvo de sufero, larmoj kaj morto". Vizitoj de diversaj famuloj, inkluzive de la sudafrika prezidento Nelson Mandela, papo Johano Paŭlo la Dua kaj usona prezidento Barack Obama, ankaŭ kontribuis por famigi la insulon.

Pilgrimejo

"Gorée estas ĉe la centro de vera pilgrimado omaĝanta la diasporon de afrikanoj. La signifo kaj loko de la insulo en la mensoj de la idoj de tiuj disigitoj permesas al ni mezuri la influon de ĉi tiu komunumo, en serĉo de perdita identeco, en la formiĝo ĉirkaŭ Gorée de memorloko pri la Atlantika sklavnegoco," klarigas la historiistoj Hamady Bocoum kaj Bernard Toulier en sia libro *La fabrikado de la heredaĵo: la ekzemplo de Gorée*, publikigita en 2013.

Vojaĝagentejoj komprenis ĉi tion. "Afrikdevenaj usonanoj kiuj volas reiri la paŝojn de siaj prapatroj, konsistigas grandan parton de nia klientaro," klarigas Mamadou Diagne, direktoro de la vojaĝagentejo Revina Tours en Dakaro. Kiel partnero de la Harlem-a Turisma Buroo, bazita en Novjorko, li planas oferti al siaj klientoj ekskurson al la memorlokoj ligitaj al la sklavnegoco en Senegalo, Gambio kaj Ganao.

> **La Domo de Sklavoj estas la plej ofte vizitata loko en Senegalo, ricevante plurajn centojn da vizitantoj ĉiutage**

Sed eksterlandaj turistoj ne estas la solaj kiuj venas por honori la postlasaĵojn de la institucioj de sklaveco. "La disvolviĝo de novaj transportiloj en Dakaro instigis senegalanojn veni. Pli kaj pli da vizitantoj venas el la afrika kontinento ĝenerale," diras Kaba Laye, asistanta konservanto de la Domo de Sklavoj. Efektive, turismo en Senegalo forte kreskis en lastaj jaroj, de 836 000 vizitantoj en 2014 ĝis 1.8 milionoj en 2022.

Tra la jaroj, pluraj iniciatoj aperis por konservi kaj plibonigi la lokon, kaj ankaŭ por kreskigi la nombron da vizitantoj kaj diversigi iliajn itinerojn. Revigliga programo, subtenata de la senegala registaro kaj de Ford-Fondaĵo, estis alprenita kun la celo kontraŭbatali marbordan erozion kaj krei itineron



Bintou kaj Issa sur la Insulo Gorée

Dum ferioj en Dakaro la ĝemeloj Bintou kaj Issa vizitas la insulon Gorée. Dum la vizito ili lernas pri la tragedio de la transatlantika sklavnegoco kaj ĝiaj longdaŭraj efikoj rilate al diskriminacio kaj rasismo.

Celdirektita al infanoj aĝaj inter 5 kaj 9 jarojn, ĉi tiu albumo estas unu el serio de sep publikaĵoj iniciatitaj de UNESKO, en partnereco kun la maroka eldonejo Langages du Sud. Eldonita kiel parto de la programo "Vojoj de Sklavigitaj Homoj" de UNESKO, la serio celas kreskigi la konscion de la juna generacio pri la historio de sklaveco, la gravaj figuroj kaj memorlokoj ligitaj al sklavnegoco, kaj la batalo de sklavigitaj homoj por libereco. Verkitaj je infana nivelo, ĉi tiuj libroj ankaŭ emfazas la kontribuojn faritajn de afrikdevenaj homoj al la moderna socio, precipe en la kampo de kulturo.



© UNESCO / Richard Veillon

◤ *La Domo de Sklavoj, konstruita en la 18-a jarcento.*

> **Pli kaj pli da vizitantoj venas el la afrika kontinento**

ligantan la Domon de Sklavoj al la Domo Victoria Albis, kiu nun enhavas muzeon pri sklavnegoco kaj novaj formoj de sklaveco. "Ĝi estas ankaŭ centro por la interpretado kaj dokumentado de la sklavnegoco. Krom fari esploradon, la centro provizas trejnadon, kaj ni volas krei ciferecan bibliotekon por arkivi la laboron," klarigas Kaba Laye.

Ekde 2017, UNESKO ankaŭ kunlaboras kun lokaj masonistoj en komenca projekto por restarigi kelkajn el la konstruaĵoj. Dua fazo estis lanĉita en 2020 por plue disvolvi la lokon per desegnado de itineroj adaptitaj al ĝia konservado, kaj per trejnado de gvidistoj.

Referenco por aliaj memorlokoj

La sukceso de la senegala insulo faris ĝin modelo por aliaj. "Estas klare ke Gorée influis aliajn memorlokojn kiuj engaĝiĝis en la laboron de rememoro," rimarkigas la historiistoj Hamady Bocoum kaj Bernard Toulier. Ĉi tio validas precipe por Benino kaj Ganao, kiuj celas disvolvi intereson pri siaj propraj lokoj de Ouidah kaj Elmina.

Tamen, iuj bedaŭras, ke la ekonomiajn enspezojn malmulte profitas la loĝantaro de la insulo. "Temas ĉefe pri turistoj preterpasantaj, restantaj dum kelkaj horoj kaj tiam forirantaj denove," plendas Lamine Gueye, kunordiganto de la turisma oficejo.

Kelkaj ankaŭ sentas, ke la turismaj itineroj neglektas apartajn trajtojn de la insulo, kiel estas ĝia kolonia arkitekturo, aŭ institucioj kiel la Historia Muzeo de Gorée, aŭ la Muzeo de la Maro. "Tamen ili provizas esencan scion por la historio de Senegalo kaj por scienca esplorado," insistas Mamadou Seck, konservanto de la Muzeo de la Maro en Gorée. Por altiri pli diversan spektantaron kaj plilongigi ilian restadon sur la insulo, kelkaj iniciatoj aperis, inkluzive de la Diaspora Festivalo de Gorée kaj *Malfermitaj Kortoj*, evento por ke lokaj loĝantoj malfermu siajn kortojn kaj ĝardenojn al artistoj.

Dum la jaroj, Gorée firmigis sin ne nur kiel simbolo de la tragedio de sklaveco, sed ankaŭ kiel ŝlosila loko por transdoni ĉi tiun doloran historion. Tamen, ekzistas ankoraŭ du grandaj defioj por fronti, se ĉi tiu pozicio estos konservita – la rapida detruo de certaj historiaj konstruaĵoj, kaj la erozio, kiu nehaltigeble forigas la marbordon de la insulo. ■

-El la angla esperantigis Orlando Raola (Usono)

Flavio Gomes

Kunprofesoro, Instituto pri Historio, Federacia Universitato de Rio-de-Ĵanejro, Brazilo

Kilomboj, centroj de afrikbrazila rezistado

Kreitaj de sklavigitoj, kiuj fuĝis de trudlaboro, aŭ de nigrulaj komunumoj post la abolo de sklaveco, kilomboj restas spacoj de memoro kaj rezistado. Tamen, multaj estas nun minacataj de nemoveblaĵaj projektoj.

Ĉu nomataj *cumbes* (en Venezuelo), *palenques* (en Kolombio kaj Ekvadoro), *maroons* (en Jamajko, Usono kaj partoj de la anglalingva Karibio), *marrons* (en Haitio kaj pluraj partoj de la franclingva Karibio) aŭ *cimarrones* (en Kubo, Meksiko kaj Porto-Riko), ĉiuj ĉi nomoj rilatas al komunumoj formitaj de fuĝintaj sklavoj en Usono kaj multaj latin-amerikaj kaj karibiaj landoj.

En Brazilo, ili estas menciitaj en koloniaj tekstoj ekde la mezo de la 16-a jarcento sub la nomo *mocambos* (“mokamboj”), kaj ekde la fino de la 17-a jarcento kiel *quilombos* (“kilomboj”). Ambaŭ terminoj devenas el Centra Afriko kaj havas la signifon “kampadejoj” aŭ “vilaĝoj”.

Ekde la unuaj jarcentoj de kolonia okupo kaj ekspluatado, formoj de nigrula kamparaneco aperis, ĉu en plantejoj aŭ en areoj dediĉitaj al nutraĵoproduktado. Komplekse organizitaj malgrandaj agrikulturoj evoluis el la kilomboj mem, tiel ankaŭ formiĝis indiĝenaj komunumoj kreitaj de homoj, kiuj fuĝis el religiaj aŭ sekularaj vilaĝoj kaj rekunmetiĝis laŭ etno.

Timo inter grandaj bienuloj

Aldone al la grandaj mokamboj kaj kilomboj de Palmares (en la regionoj de Alagoas kaj Pernambuko), gvidataj de la ĉefoj Ganga-Zumba kaj Zumbi, kiuj daŭris de 1575 ĝis 1743, multaj komunumoj de fuĝintoj estiĝis en Amazonio, sed ankaŭ en Bahio, Sergipe, Rio Grande do Norte kaj Piauí. Ili disvastiĝis tra la tuta lando, inkluzive de la koloniaj regionoj de Goiás, Mato Grosso kaj Minas Gerais.

> **“La konstituciaj dispozicioj de 1988 preskribas, ke kilombanoj ricevu definitivan proprieton de siaj teroj**

En la 19-a jarcento, tiuj komunumoj multobliĝis tra la tuta lando, precipe en San-Paŭlo, Rio-de-Ĵanejro kaj Rio Grande do Sul. Ĝis la antaŭtagoj de la forigo de sklaveco en 1888, okazis senfinaj kolektivaj fuĝoj kaj kreadoj de kilomboj, kiuj semis timon inter la grandaj bienuloj kaj la aŭtoritatoj tra Brazilo, eĉ atingante la urbojn.

Kilomboj ankaŭ estas la rezulto de jarcentaj formoj de okupo, same kiel la donaco de teroj al liberigitoj jam en la fino de la 18-a jarcento. Grava historia procezo, kiun ni devas konsideri, estas la migrado de nigraj familioj kaj la okupado de teroj dum la lasta jardeko de sklaveco kaj dum la unuaj jaroj post emancipiĝo. Kun la post-emancipiĝo, tiuj procezoj iĝis eĉ pli kompleksaj, kun la migrado de kamparanaj popolgrupoj, kiuj formis teritoriojn, lokojn, komunumojn, kolektivojn kaj kamparajn nigrulajn najbarejojn, kiuj hodiaŭ nombras milojn kaj troviĝas tra la tuta Brazilo.



© Nicola Lo Calzo



◥ *La fiŝista komunumo Acupe, en la ŝtato Bahio, estas unu el la 6 mil kilomboj tra Brazilo. La loĝantoj de tiuj esence kamparaj komunumoj estas posteuloj de grupoj de fuĝintaj sklavigitoj.*

Agnosko

En la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj – kaj precipe en 1988 kun la promulgo de la Konstitucio, kaj en 1995 pro la tricentjariĝo de la morto de Zumbi – la sociaj luktoj de la kilombanoj (loĝantoj de kilomboj) en Brazilo gajnis forton. La termino "nigrulaj kamparaj komunumoj de kilombaj posteuloj" identigas kamparajn komunumojn – ankaŭ trovatajn ene de urbaj periferioj – kies loĝantoj estas posteuloj de kilombanoj, de grupoj de fuĝintoj kaj eĉ de liberigitoj kaj liberaj nigruloj.

La termino "kilomba posteulo" estis enkondukita en la brazilan Konstitucion de 1988. La konstituciaj dispozicioj postulis, ke kilombanoj estu agnoskataj kiel la definitivaj posedantoj de siaj teroj. Konstituciaj rajtoj ankaŭ estis donitaj por konservi kulturojn agnoskatajn kiel kultura heredaĵo.

Sed malgraŭ ĉi tiu nova leĝaro, la nombro de komunumoj kun agraraj titoloj restas tre malalta. Pli malbone, en la lastaj dek jaroj oni vidis pliiĝon en la nombro de murdoj de kamparaj nigraj kilombaj gvidantoj, kiuj batalas kontraŭ ter-ŝtelistoj kaj krimaj invadoj de iliaj teritorioj. Paradokse, ĉi tiuj novaj rimedoj havis la efikon malrapidigi la donadon de titoloj kaj la agnoskon de kilombaj teritorioj fare de la aŭtoritatoj. Premo de la terposedantaj sektoroj estis akompanata de la malrapideco de ŝtataj kaj federaciaj organoj en la transdonado de definitivaj proprieto-titoloj.

Longdaŭra lukto

Antaŭ tiu fono, etnografoj kaj esploristoj specialiĝintaj pri la historio de kilomboj kaj mokamboj en la 17-a, 18-a kaj 19-a jarcentoj sugestis vastigi la difinon de kilombo, same kiel tiu de restantaj komunumoj. Eĉ ekzistis movado – kun engaĝiĝo de la loĝantoj kaj gvidantoj de la komunumoj mem – por redifini la signifon de kilomboj surbaze de konceptoj pri memoro, etneco, teritorio kaj civitaneco.

Laŭ la plej lasta popolnombrado, en 2023 estas ĉirkaŭ 1.3 milionoj da kilombanoj tra la lando. Dum la sekva jardeko, ilia nombro povos altiĝi al unu procento de la loĝantaro de Brazilo, kio alproksimigos ilin al nombro de indiĝenoj, kiuj nuntempe estas 1.6 milionoj. La lukto por tero de ĉi tiuj kamparaj nigrulaj komunumoj estas longtempa procezo, kun alternaj ĉapitroj de politika ago, registaraj intervenoj, la partopreno de historiistoj kaj antropologoj, parlamentaj debatoj kaj, precipe, la mobilizado de sociaj movadoj.

Debatoj pri rasa malegaleco, aliro al la tero, publikaj politikoj kaj vastigo de civitaneco, kaj eĉ kompensoj por pli ol 350 jaroj da kolonia kaj post-kolonia sklaveco, trairas la luktojn de modernaj kilomboj tra Brazilo, kie ili reprezentas preskaŭ 6 000 komunumojn kaj eble nombros tri milionojn da homoj meze de la 21-a jarcento. ■

-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)

◤ *La memoriga praktiko de Nego Fugido ("fuĝinta nigrulo") en la kilomba komunumo de Acupe. Unue farita post la abolo de sklaveco en 1888, ĝi ilustras la lukton de la sklavigitoj por sia liberiĝo..*

Guillermo G. Espinosa

Guillermo G. Espinosa
Ĵurnalisto kaj historiisto,
Havano, Kubo

Esteban Montejo, la historio de la lasta cimarona sklavo de Kubo

En la fruaj jaroj 1960-aj, la kuba verkisto kaj etnologo Miguel Barnet kolektis la ateston de Esteban Montejo, afrikdevena 104-jaraĝulo. La tre influa rakonto kiun li verkis, estas unika dokumento pri la stato de kaptitoj kaj la perforto de la sklavisma sistemo.

Legante la ĵurnalon, Miguel Barnet trovis foton kiu kaptis liajn okulojn – artikolon pri 104-jaraĝa afrikdevenulo, filo de kaptitoj portitaj al ĉi tiu karibia insulo dum la lasta ekspedo de afrikaj sklavoj meze de la 19-a jarcento. Lia nomo estas Esteban Montejo, kaj li estis sklavo antaŭ ol fuĝi junaĝe en la arbarojn de kubaj centraj montaroj por akiri sian liberecon. Li estis la lasta sklavo cimarono (fuĝinta sklavo).

Kiel studento pri sociologio en la Universitato de Havano, Miguel Barnet tuj rekonis la intereson de ties atesto. Li iris al la Centro de Veteranoj por renkonti ĉi tiun altan, ankoraŭ fortikan viron kun brilaj okuloj. En la 1960-aj jaroj, ŝajnis malprobable ankoraŭ povi trovi eks-sklavon en ĉi tiu lando, des malpli viron kies vivo komenciĝis dum la hispana kolonia erao kaj finiĝis sub la socialisma revolucio de Fidel Castro, post travivi la militojn de sendependiĝo kaj la intervenon de Usono en 1898.

Tri jaroj de intervjuoj kaj verkado rezultis en libro *Biografía de un cimarrón*, publikigita en 1966 (*Biografio de cimarono*, 1968). Verkita en la unua persono, la rakonto havis grandegan eĥon, multe preter la landlimoj de Kubo. La libro estis publikigita en multaj lingvoj kaj landoj – 64 eldonoj je la lasta nombrado – sen mencii neoficialajn publikaĵojn, laŭ la asistanto de Miguel Barnet, Lázaro Castilla.

Suspekto kaj malfido

Ĉi tiu rakonto estas parto de jam profunde ankrita literatura tradicio en la lando. Sklaveco aperis kiel temo en la komenco de la 19-a jarcento en la eseoj de Félix Varela (1788-1853), konsiderata pioniro de kuba intelekta pensado, kaj lia disĉiplo José Antonio Saco (1797-1879). En tempo en kiu afrikaj kontribuoj al la hispana heredaĵo de Kubo estis rigardataj kun disdegno, Fernando Ortiz (1881-1969) – la pioniro de nacia antropologio kaj profesoro Barnet – aŭdacis aserti ke, sur la plej larĝa insulo de Antiloj, ekzistis "transkulturado" fare de la nigruloj perforte venigitaj el Afriko kaj iliaj posteuloj. Inter 1763 kaj 1845, centmiloj da homoj alvenis sur la insulo por labori, ĉefe en la sukerkanplantejoj.

La esploro de Ortiz ŝanĝis la evoluon de la kultura percepto kiun Kubo havis pri si mem. Sekvante la spurojn de Ortiz, Miguel Barnet povis aserti, aŭskultinte la rakonton de Esteban Montejo, ke "multaj el la tipaj trajtoj de la kuba homo troviĝis en li".


Nuntempe 84-jaraĝa, Barnet ankoraŭ memoras siajn renkontiĝojn kun la maljunulo, al kiuj li iris portante pezan magnetofonon. La unuaj renkontiĝoj inter Esteban kaj la juna esploristo kun katalunaj radikoj ne estis facilaj. "Li rigardis min kun suspekto kaj malfido", li skribas en la aneksaĵo de unu el la eldonoj. La ĉeesto de la magnetofono helpis tamen – Montejo estis fascinita de la reproduktado de sia voĉo. " Li konsciiĝis ke li estas grava persono", li klarigis.

> **"En Kubo ekzistis "transkulturado" fare de nigruloj devigitaj veni de Afriko**

Libera!

Atesto por posteuloj, la libro montras la mizeran staton de *barracones* – la simplaj kabanoj kie la sklavoj vivis –, la malfacilajn laborkondiĉojn en la sukerfabriko *Flor de Sagua*, kaj la korpajn punojn ricevitajn de la sklavoj, inkluzive infanojn, donante tre palpeblan perspektivon pri la perforto de la sklava sistemo.

La libro priskribas ankaŭ la junulan solecon en la montaro, la serĉon de manĝaĵo kaj medicinaj herboj, kaj la pli kontemplajn momentojn kiujn li pasigis rigardante birdojn, vespertojn kaj reptiliojn.



© Marc Daniau por UNESKO-Kuriero

◥ *Esteban Montejo, la lasta sklavo cimarono de Kubo.*

La historio estas ankaŭ tre valora fonto de informoj pri la ĉiutaga vivo sur la insulo fine de la 19-a jarcento, la praktikado de afrik-kubaj religioj – ĉefe santerío –, samkiel dancoj, tradicia kuracado kaj ludoj.

Montejo vivis kaŝe en kavernoj kaj arbaretoj ĝis la tago kiam estis dekretita la nigrula emancipiĝo en 1886. Estis granda ekscitiĝo en la plantejoj. "Laŭ la krioj de la homoj, mi sciis ke sklaveco finiĝis… Kiam mi forlasis la montaron, mi komencis promeni kaj renkontis maljunan virinon kun du infanoj en ŝiaj brakoj. 'Diru al mi', mi demandis ŝin, 'ĉu estas vere ke ni ne plu estas sklavoj?' Ŝi respondis: 'Ne, filo, nun ni estas liberaj'", rakontas Miguel Barnet en sia libro.

Barnet priskribas sian laboron kiel "atestan romanon", inspiritan de rakonto pri la vivo de meksika indiano, titolita *Juan Pérez Jolote, Biografía de un tzotzil*, publikigita en 1952 de la antropologo Ricardo Pozas.

Biografio de cimarono estas rakonto verkita en la unua persono kiu konfrontas la leganton kun la parolmaniero de homo kiu miksas buŝajn kubajn kamparanajn esprimojn kun pecoj de afrika kaj karibi-indiana lingvaĵo, adaptita por doni al la teksto literaturan senton.

> **"Laŭ la krioj de la homoj, mi sciis ke sklaveco finiĝis…**

Unika atesto

Biografio de cimarono estas unika en la historiografio de sklaveco en Kubo kaj Latinameriko. Ĝia eĥo estis tia ke, post la publikigo, la vivo de Montejo inspiris operon de la germana komponisto Hans Werner Henze, poste adaptita de la germana poeto kaj eseisto Hans Magnus Enzensberger, kaj voĉlegita de la aktoro kaj direktoro Jean Vilar, de la Comédie française.

Barnet daŭre skribis pliajn atestajn librojn. Unu el ili, *Galego* omaĝas migrantajn laboristojn de nordokcidenta Hispanio. En 1997, li ricevis subtenon de UNESKO por la kreado de la Nacia Muzeo de Sklava Itinero en hispana fortikaĵo de la 17-a jarcento, en la kuba haveno Matanzas, lulilo de afrik-kuba kulturo.

"Por li, la afrika komponanto de la kuba kulturo estas kerna", diras Nancy Morejón, kuba poeto kiu memoras la poemon titolitan *Ebbó* ("purigo" en la joruba) por la sklavoj. "Temas pri kontraŭkoloniisma aliro al niaj radikoj, pri kio li verkis en familiara stilo, sen rezigni pri formala beleco".

La verkisto memoras la tagon kiam Miguel portis ŝin por vidi Esteban Montejo. "Li estis 110-jaraĝa. Li kuŝis. Kaj li diris al ni: 'Maĉeto estas ĉio kion mi bezonas', frazo per kiu la biografio finiĝas, rilatante al lia vivo kiel soldato, sukerkantranĉisto kaj fuĝanto en la montaraj arbaroj. ■

-El la angla esperantigis Manuela Burghelea (Belgio)

La ribelaj rultabulistinoj de Koĉabambo, en Bolivio


Kiu diris, ke rultabulado estas sporto por viroj en ĝinzo kaj kapuĉo? Certe ne supozas la rultabulistina grupo *ImillaSkate*, kies membroj senpripense kuras malsupren sur la deklivoj de Koĉabambo, la tria plej granda urbo de Bolivio. Ekde kiam la grupo estis fondita, en 2019, ili praktikas la sporton vestitaj en *polera*, grandan tradician jupon. Enkondukita dum la hispana konkero en la 16-a jarcento, la jupo poste iĝis integra parto de la identeco de indiĝenaj virinoj (*cholitas*) de la andaj altebenaĵoj.

Kun bombínaj ĉapeloj fiksitaj sur siaj kapoj kaj longaj plektaĵoj blovataj en la vento, Deysi, Brenda kaj Huara praktikas ĉi tiun surstratan sporton, ludatan en Olimpikoj ekde 2020, sen perfidi siajn indiĝenajn originojn – aŭ pli ĝuste, proklamante ilin laŭte kaj klare. Evidenta elekto por ĉi tiuj junaj virinoj naskitaj en socio kie pli ol 40 procentoj de la loĝantaro estas de indiĝena origino. "Porti poleron al rultabulo... montras, ke ni ĉiuj povas fari tion, kion ni amas, sendepende de tio kion ni surhavas aŭ de kie ni venas," asertas Tefy, unu el la naŭ membroj de *ImillaSkate*.

Ilia aŭdaco allogis brazilan fotistinon Luisa Dörr. El sia renkontiĝo kun *Imilla Skate*, ŝi produktis la serion *Imilla 2021*, kun la signifo "junulino" en la ajmara kaj la keĉua lingvoj, la du plej vaste parolataj indianaj idiomoj en Bolivio.

Imilla estas la plej nova el la serio de Luisa Dörr prezentanta virinojn plene povigitajn en siaj vivoj, kiel en *Firsts* (2016-2017), portretoj de virinoj ŝanĝantaj la mondon, kaj *Falleras* (2018), kiu montras la kostumitajn loĝantojn de Valencio, Hispanio, dum la Festo de Sankta Jozefo, okazigita ĉiujare en marto. En 2019, la fotisto ricevis la trian premion pro tiu laboro en la kategorio Rakontoj/Portretoj ĉe la prestiĝaj premioj de *World Press Photo*.

-El la angla esperantigis Luigia Oberraich Madella (Italio)



La plej ŝatata rulglitejo de Imilla Skate *estas SENAC en la montetoj de Koĉabambo.*


Fotoj
Luisa Dörr

Teksto
Katerina Markelova,
UNESKO





◥ *Miriam Estefanny Morales M., 23-jaraĝa, (Tefy) opinias, ke porti polero-jupon al rultabulo montras, ke iu ajn kapablas fari ion ajn, malgraŭ tio, kion ili surhavas aŭ de kie ili venas.*





◥ *Joselin Brenda Mamani Tinta (27- jaraĝa) kaj Lucia Rosmeri Tinta Quispe (46- jaraĝa).*



◥ *La intereso de junaj urbanoj pri tradiciaj vestaĵoj ĝojigis la vendistojn ĉe la vendejo Cancha en Koĉabambo.*



◥ *María Belén Fajardo Fernández (21-jaraĝa) estas studentino pri fizioterapio. Ŝi ŝatus egaligi sian karierelekton al sia pasio, uzante sian medicinan scion por helpi rultabulistojn.*




◥ *Por Deysi Tacuri Lopez (27-jaraĝa), rultabulado ne estas nur sporto, ĝi ŝanĝis ŝian vivon. Ŝi volas popularigi la praktikon inter la juna generacio.*



◥ *Deysi Tacuri Lopez (27-jaraĝa) gajnis plurajn medalojn en Ĉilio kaj Bolivio.*



◥ *La familio de Luisa Zurita ne aprobis ŝian pasion por la rultabulo ĝis ŝia partopreno en loka televida programo.*





Loko por rultabulado en Quillacollo, en antaŭurbo de Koĉabambo.



◥ *Huara Medina Montano (24-jara). Por la membroj de* Imilla Skate, *hararanĝoj estas parto de ilia indiĝena identeco.*



◥ *Por Ellinor Buitrago Méndez, rultabulistinoj portantaj polero-jupon sendas mesaĝon de forto kaj identeco,precipe al aliaj virinoj.*

Vojaĝado sen postlasi spurojn


Transportaj obstrukcoj, rapide kreskantaj kostoj de domproprajĝoj, detruado de ekosistemoj: troa kvanto de vizitantoj postulas grandajn tributojn de lokaj enloĝantoj. De Barcelono al Venecio, de Kioto al Balio, aŭtoritatoj ekagas por redukti la amason de vizitantoj sen sekigi tiun gravan fonton de enspezoj. Estas malfacile starigi bilancon.



Maja Golfo en Tajlando.

Joseph M. Cheer

Profesoro pri Daŭripova Turismo kaj Heredaĵo, Okcidenta Universitato de Sidnejo, Aŭstralio, kaj kunestro ĉe la Konsilio pri Monda Estonteco de la Monda Ekonomia Forumo pri estonto de daŭripova turismo. Li estas la ĉefa kuneldonanto de la scienca revuo Turisma Geografio.



© Humphrey Muleba / Unsplash

Kiam Louis Turner kaj John Ash en 1975 la unuan fojon publikigis *La Orajn Hordojn: Internacia Turismo kaj la periferio de plezuro*, zorgoj pri ekscesa turismo jam evidentiĝis. Ne hazarde ili uzis la esprimon "oraj hordoj", komparante la efikojn de turistogrupoj kun la "kultura dezertiĝo lasinta en la sekvo de la granda barbara migrado".

De tiam la "oraj hordoj" plu kreskis. Kun pli granda bonstato, scio, kaj teknologiaj progresoj, vojaĝado fariĝis pli oportuna kaj malpli kosta. Nuntempe turismo grave kontribuas al lokaj kaj naciaj ekonomioj – en 2023 ĝi respondecis por 9.1 procentoj de la monda malneta enlanda produkto, kio ekvivalentas al al 9.9 mil miliardoj da usonaj dolaroj.

Kutime la koncepto de troturismo rilatas al turismaj aktivaĵoj kiuj superas la kapablon de iu loko. Sed enfokusi nur simptomojn, anstataŭ konsideri ankaŭ pli vastajn sistem-rilatajn kialojn, trosimpligus aferojn. Troturismo inkludas faktorojn, kiuj negative efikas al loĝantoj, malpliigas la esencajn signifojn de lokoj, kaj kontribuas al socia, kultura kaj media senvalorigoj. Ĝi evoluas de longdaŭra, malrapida ŝanĝo, kaj tie, kie turismo instigas ŝanĝon, ĝi estas stimulita de tiuj, kiuj volas plibonigi ekonomiajn enspezojn.

Lokoj "kiujn vi devus esti vizitintaj"

En la libro *Troturismo: Ekscesoj, malkontenteco kaj rimedoj por vojaĝado kaj turismo*, kiun mi publikigis kun Claudio Milano kaj Marina Novelli, troturismo estas difinita kiel troamasiĝo de vizitantoj, kio igas loĝantojn "suferi la konsekvencojn de nedaŭraj kaj sezonaj amasiĝ-maksimumoj, kio kaŭzas daŭrajn ŝanĝojn al iliaj vivmanieroj, malhelpas aliron al komforto kaj damaĝas ilian ĝeneralan bonstaton."

Plendoj pri neregebla turismo ne estas novaj, kaj ekestis kiam progresoj de aertransportado permesis aliron al lokoj, kiuj antaŭe estis malfacile kaj multekoste atingeblaj.

Jam en 1963 la germana geografo Walter Christaller aludis al la urĝeco regi turismon: "Mi hezitas mencii tiajn lokojn, ĉar tiukaze mi iĝus kulpa ilin konigi", li diris, kondukante al tio, ke malpli konataj lokoj iĝis "evoluintaj ripozlokoj, kiujn vi devus esti vizitinta."

Estas neklare, kiam la unuan fojon la esprimo "troturismo" aperis. La ĵurnalistino Freya Petersen uzis ĝin en 2001 en artikolo en la gazeto *Sydney Morning Herald* por indiki la malagrablecon, kiun kaŭzis tro multaj vizitantoj ĉe la arkeologia loko Pompejo.

"Turisma poluado"

Vidindejoj trafataj de troturismo troviĝas ĉie en la mondo, kaj la konsekvencoj de tro da vizitantoj okazas pro diversaj kialoj. Ekzemple en Balio, Indonezio, la efikoj de troturismo estas evidentaj en la kresko de vivtenaj kostoj, kaj kolizioj de kulturoj oftas, kiam turistoj malrespektas la kutimojn de sanktaj lokoj. La publika infrastrukturo ne povis disvolviĝi sinkrone kun la kreskanta postulado; tio rezultis en trafikŝtopiĝoj en turismaj lokoj kaj en kreskanta postulado de malpliiĝantaj akvoresursoj.

> **"Ekscesa turismo disŝiras la socian kaj ekologian medion de malgrandaj insuloj**

La riĉa kulturo de Kioto (Japanio) estas alloga por amasturismo kaj kaŭzis la aperon de *kankō kōgai*, kiu signifas "turisma poluado". Ĝi starigas al la urbo la defion provi regi la fluon de vizitantoj kaj reguli turismon adekvate.

Efikoj sur la medio estas alia rezulto de ekscesa turismo, precipe sur grandaj insuloj, kie la sociala kaj ekologia medioj rapide fariĝas troŝarĝitaj. La insuloj Borakajo (Filipinoj) kaj Komodo (Indonezio), kaj la Maja Golfeto (Tajlando) estas ekzemploj de tio.

Ankaŭ krozŝipoj povas havi negativan efikon, kiel montras Venecion, la plej konata ekzemplo de troturismo. La entuziasmo konsumi la urbon troŝarĝis →

ĝin. Turismo koncentriĝas en tiuj partoj de la urbo, kiuj altiras krozŝipan turismon, kaj nun registaraj rimedoj devas reguligi ĝin. La evoluo de la urbo prilumas la dualecon de troturismo: ekonomia profito havas sian koston, kiam la sociaj kaj mediaj efikoj estas preteratentitaj.

La evoluo de turismo ankaŭ koncernas Barcelonon, Hispanio. La urbo havis malgrandajn perspektivojn, antaŭ ol ĝi aperis sur la monda turisma scenejo kun la Someraj Olimpiaj Ludoj en 1992, kaj la urba kultura heredaĵo daŭre populariĝis, inkludante allogaĵojn kiaj estas la fama arkitektura verko La Sagrada Familia de Antoni Gaudí kaj la katalunaj gastronomio kaj kulturo. Barcelono klopodis reguligi ekscesan turismon kaj ĝian daŭran kreskon, ekzemple per limigita aliro al popularaj vidindaĵoj kiel la fama Parko Güell.

Sed la efikoj de troturismo sur lokaj loĝantoj ĝenerale ĉie samas, sendepende pri kiu lando temas. Kiam enspezoj el turismo rapide kreskas, loĝantoj trovas sin ekskluditaj de siaj najbarecoj kaj devas translokiĝi aliloken; ankaŭ malgrandaj entreprenoj devas forlokiĝi kaj estas anstataŭitaj de famaj internaciaj markoj. Tro multaj turistoj malfaciligas aĉetumadon kaj aliajn ĉiutagajn aktivaĵojn por lokanoj, kaj la bruo kaj kruda maniero de noktaj vizitantoj – inkluzive de la konsumado de drogoj kaj alkoholo en publikaj lokoj, kaj etkrimeco – signifas, ke loĝantoj ne plu estimas siajn najbarecojn kaj ne plu sentas sin hejme. Oni konsideras, ke tro multaj turistoj detruas la karakteron de koncerna loko, sen eĉ rimarki, kio estas plej speciala pri ĝi – krom tio, kio bonaspektas por esti publikigita en Instagramo.

> **“Redukti krozŝipajn alvenojn kontribuas por redukti troamasiĝon**

Enirbiletoj kaj limigitaj malfermaj horoj

Por respondi al tiuj minacoj, urbaj konsilantaroj kaj publikaj aŭtoritatoj ekagis. Plurspecaj rimedoj estas aplikataj, kaj ili daŭre evoluas. Ilia sukceso aŭ malsukceso estos testata dum kelkaj

Turistoj amasiĝas sur la ponto Rialto, en Venecio, Italio, en aprilo 2023.



© Simon LAMBERT / DIVERGENCE

turismosezonoj, kiuj montros kiuj solvoj estas la plej efektivaj por longa tempo, kaj la plejmulto de aliroj estas ankoraŭ novaj, konsidere al la revekiĝo de turismo en 2023 kaj 2024 post la pandemio de KOVIM-19. Kelkaj pozitivaj rezultoj jam liveris antaŭvidojn al tio, kio povus funkcii.

Redukti aŭ malpermesi krozŝipajn alvenojn, kaj la akompanantan tumulton de vojaĝantoj, helpas limigi troamasiĝon. Ekzemple, Amsterdamo decidis transloki sian kajon por krozŝipoj for de la urbocentro.

Limigi la kvanton de turistoj al iuj vidindaĵoj sukcesis, kaj same la fordirektigo de turista trafiko al malpli konataj lokoj, ĉu ene de muzeoj, ĉu ene de urboj aŭ landoj. Vizitantoj, kiuj volas rigardi la faman David-statuon de Mikelanĝelo en la Galerio de l' Akademio en Florenco, Italio, trovos sin ĝentile alidirektitaj al vizito de aliaj artefaktoj en la muzeo. La mota signo de Amsterdamo: "I ❤ Amsterdam" (Mi amas Amsterdamon), populara por memfotado, estis translokigita aliloken por redukti amasiĝon, kaj dum ferioplanado, turistoj pli kaj pli estas kuraĝigitaj viziti aliajn alternativajn cellokojn – Valencion (Hispanio) anstataŭ Barcelono, ekzemple.

Ekzistas ankaŭ aliaj provoj protekti loĝantojn kaj ties hejmojn. Pli kaj pli, mallongdaŭraj feriaj luprenoj devas esti licencitaj aŭ registritaj, por ke oni taksu iliajn influojn sur najbarecoj, kaj elirmalpermesoj estas lanĉitaj por redukti bruon kaj kunvenojn dumnokte.

Kelkaj turistaj cellokoj, kiel Maja Golfeto (Tajlando) kaj la insulo Borakajo (Filipinoj), jam fermiĝas dum limigita tempo por permesi al la naturo ripozi post troa vizitado, kaj la Feroaj Insuloj ĉiujare fermiĝas dum limigita tempo por vartado.

Malpli sukcesa estas la lanĉo de enirkotizoj por turistoj por regi ilian efikon, kio videblis en Venecio (Italio) kaj en Japanio. Ĉar tiuj pagoj estas relative modestaj, ili ne detenas homojn de vizitoj. Tio estas la kazo ankaŭ de aliaj kotizoj por turistoj, kiel la 30-taga turistvizo por Balio, kiu ne vere reduktis la kvanton de vizitantoj.

Malfacila ekvilibro

La efikoj de ĉi tiuj strategioj restas atendendaj, sed tio certas: oni devas alpaŝi ekvilibron, ĉar troturismo ne malaperos. Kelkaj, kiel Tony Wheeler, kunfondinto de la libroforma vojaĝgvidilo *Lonely Planet'*, konstatas, ke troturismo povas esti mildigita per eta kondutŝoviĝo de la turistoj per eksplorado de vidindaĵoj "nur du stratojn pli fore"; li diras: "Estas rimarkeble, kiel malsame aferoj povas aspekti nur du stratangulojn for de la ĉefstrato."

La defio estas trovi la ĝustan kompromison. Finfine, troturismo devas esti alparolata per akordigaj kompromisoj. Turismo verŝajne ĉiam kaŭzas efikojn kaj transformadojn al lokoj–la ŝlosilo por solvi problemojn estas trovi la ĝustan ekvilibron.

Rimedojn por redukti la kvanton da vizitantoj oni devas zorge konsideri, aliakaze ili povas esti katastrofaj por komunumoj, kie turismo subtenas la lokajn vivrimedojn. Necesas trovi la delikatan ekvilibron inter efika reguligo kaj planado, por certigi la bonfarton de la komunumo.

Ni ne pretervidu la pozitivan kontribuon de turismo por komunumoj kaj ties perspektivojn por longa tempo. Kiel asertas Tony Wheeler, "al ĉiu plenplena metropolo korespondas probable dekduo da lokoj, kiuj tre volonte farus atenteman malgrandan paŝon por eliri el 'maltroturismo'". ■

> **"Pli kaj pli turistoj estas kuraĝigitaj viziti alternativajn ferilokojn**

-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)


Turismo kaj Monda Heredaĵo

Malgraŭ, ke alfluo de turistoj povas liveri ekonomiajn avantaĝojn al lokoj kun Mondaj Heredaĵoj, ĝi povas ankaŭ havi sufiĉe gravan influon sur la vivkvalito de loĝantoj. Respondeca konduto estas decida. Troamasiĝo, premado al la medio, kaj ŝarĝo sur lokaj resursoj estas nur kelkaj el la defioj, kiuj povas aperi. Por solvi tiujn aferojn, UNESKO fokusiĝas sur administrado de vizitantoj, efika perado, kaj novigado.

UNESKO lanĉis kelkajn projektojn por solvi troturismon je loka nivelo. Unu ekzemplo estas la "Mondheredaĵaj Vojaĝoj", kreita en partnereco kun *National Geographic*, interreta platformo, kiu kuraĝigas homojn vojaĝi al malpli konataj lokoj de la Monda Heredaĵo en Eŭropo. Por trakti la grandan alfluon de turistoj, kiuj venas nur dum unu tago en la malnovurbon de Mostaro, Bosnio-Hercegovino, UNESKO kunlaboris kun lokaj aŭtoritatoj por lanĉi la "Mostaro-Pasporton", kiu instigas vizitantojn restadi pli longe kaj malkovri aliajn kulturajn travivaĵojn de la urbo. Ankaŭ elektronika "vinjeto" estis inventita por pagigi turismajn busojn por eniri la urbon. En Angkoro (Kamboĝo), la programo "pago por laboro" subtenis la renovigon de komunumaj ekskursboatoj surloke, tiel kreante 40 novajn postenojn kaj helpante al la distribuado de vizitantoj kaj la plialtigo de enspezoj el turismo.

NIA GASTO

Patrick Chamoiseau : *“Ni devas havi la riĉecon de ĉiuj lingvoj de la mondo”*



© Philippe MATSAS / Opale.photo

Intervjuita de
Agnès Bardon
UNESKO

Patrick Chamoiseau, unu el la plej gravaj verkistoj de Karibio, publikigis multajn eseojn kaj romanojn, inkluzive de *Texaco*, kiu gajnis la Premion Goncourt en 1992. Tiu denaskulo de Martiniko (Francio), heredanto de Aimé Césaire kaj Édouard Glissant, ankaŭ helpis forĝi la koncepton de kreoleco, kiu metas la kreolan lingvon ĉe la koro de projekto por emancipiĝo kaj pensado pri la interkultura fekundigo. Rememorigante al ni, ke ne ekzistas hierarkio inter lingvoj, li invitas nin liberiĝi de neeviteble antikva unulingva imagokapablo.

En* Kreola Infanaĝo *(Une enfance créole), vi priskribas kiel vi estis mutigita, kiam vi malkovris, ke alia lingvo ol via propra, la kreola, estis trudita en la lernejo. Kiel tiu unua sperto, ĉi tiu konfronto kun la lingvo reganta, la franca, efikis sur vin ?

Tiam la absoluta naturo de lingvoj estis trudita al ni de la koloniantoj. Por pravigi sian ekspluatadon de la Nova Mondo, de homoj kaj de vivaĵoj, ili evoluigis pravigan Grandan Rakonton, en kiu la ideoj de "civilizacio" "progreso" "evoluo" "universalismo" kaj "identeco" okupis la ĉefan lokon.

Por pravigi malestimon al aliaj lingvoj, ili sanktigis sian propran. Ilia lingvo fariĝis la sola rimedo por aliri civilizacion, kulturon, la universalecon aŭ eĉ veran homecon.

La koloniitoj evoluigis kontraŭargumentadon, laŭde celebrantaj sian propran lingvon por pli bone kontraŭstari tiujn de la dominantaj. Farinte tion, ili bedaŭrinde pravigis la ideon, ke lingvoj povus esti hierarkie rangigitaj. Niaj lernejaj instruistoj (tre ofte apogantoj de ĉi tiu hierarkio) sentis, ke estas necese savi nin, etajn nigrajn infanojn, de la kreola lingvo, de nia denaska lingvo, por ebligi al ni aliron al "civilizacio", kaj certe al "homeco"- per la lingvo de la franca mastro.

En tiuj tagoj, la denaska lingvo ankoraŭ influis per potencaj impregnadoj. La kreola enloĝis mian menson, strukturis mian imagon kaj formis la bazon de mia renkontiĝo kun la datumoj de la reala mondo. Subite malpermesi ĝin, estis egale al lobotomio por mi. Mi ne plu havis aliron al spontanea esprimo; mi estis "sub traduko", kiel povus diri la maroka sociologo Abdelkébir Khatibi. Mi devis traduki mian tutan ekziston en la francan, sub la minaco kaj timo, kiujn tiu lingvo elvokis.

Krome, granda parto de ĉiu lingvo estas netradukebla, nekomunikebla kaj neesprimebla.

Tiu parto estas des pli signifa en subigita lingvo, kiel la kreola estis kaj ankoraŭ estas en Martiniko. Do, por mi, esprimi min en la reganta lingvo signifis transdoni nur la transdoneblan parton de mia denaska lingvo, kaj ĉio cetera estis simple perdita. Oni perdas iom de sia animo, sia kreemo, sia aŭdaco, kaj ĉefe la entuziasmon, kiu igas esprimon potenca, kiam ĝi kunigas la direndaĵon, la nedirendaĵon kaj la neesprimeblaĵon.

> **“Granda parto de ĉiu lingvo estas netradukebla, nekomunikebla kaj neesprimebla**

Kio savis min, estis, ke antaŭ ol ekiri al lernejo, mi jam estis leganto de libroj. Legado disvolvis, en parto de mia menso, francan kapablon kiu ne estis parola, sed skriba. Mi iris de legado al skribado, sen trapasi la parolan etapon. Mi povis skribi france pli bone ol mi povis paroli ĝin. Mi fariĝis speco de ĉeldividiĝo, kiel dirus nia granda haitia poeto Frankétienne. Ĉi tiu lingva tragedio estis la sorto de ĉiuj koloniitaj popoloj de la mondo, sed ĝi ankaŭ estis la neanstataŭebla fermento de iliaj literaturoj...

Kiel oni sukcesas produkti veran, inventeman kaj liberan parolmanieron en tia situacio? Kiel oni sukcesas trovi sian vojon, sian voĉon, en ĉi tiu "senvoja vojaĝo" kiu estas verkado?

Kion mi lernis el ĉi tiu dolora sperto, estas la jeno: ni ne devas rangigi lingvojn laŭ graveco, tute male. Ni devas havi la riĉecon, konkrete aŭ poezie, de ĉiuj lingvoj de la mondo. Neniu lingvo povas flori sole – ĝi bezonas la kunlaboron de aliaj lingvoj, kiujn ĝi alvokas, bonvenigas kaj respektas.

Fine, ni devas forlasi la unulingvan fantazion de la koloniantoj kaj moviĝi al *plur-trans-lingvan imagaron*, kiu ne rilatas al poliglota kapablo, sed kiu tendencas al la deziro – imagado de *ĉiuj lingvoj en la mondo*, kiujn ni konas aŭ ne. Kun tia imago, neniu lingvo povus domini aliajn, kaj neniu lingvo estus minacata ie ajn sen planeda protekta impulso.

Tio prezentas multajn defiojn kadre de edukado kaj kultura agado. Rilate al verkado, la *plur-trans-lingva imagaro* postulas la regadon de lingvo. *La vortuzo estas ekposedo de ĉiu lingvo: aŭtoritato*. Ne temas pri defendo aŭ ilustro de iu lingvo, sed pri vastigo de ĉiu vorto, ĉiu frazo, ĉiu signifo, ĉiu bildo, por ke ili povu voki, signali, invoki la eblon de la aliaj lingvoj de la mondo.

La vivanta uzo de la aliaj lingvoj rompas la fierecon de lingvoj,


> **Ni ĉiuj devus evoluigi ene de ni la poetikan dimension de ekzisto**

ties sciencan sanktigon, por malfermi ilin al siaj neadekvataj elementoj, al siaj neesprimeblaj elementoj, al la tumulto de sia propra malsukceso, kaj tiel devigi ilin deziri la ĉeeston de aliaj lingvoj ĉirkaŭ ili. La irlanda verkisto James Joyce ofte diris, ke li iras tiel malproksimen kiel li povas iri kun la angla lingvo. La martinika poeto kaj romanverkisto Édouard Glissant deklaris: "Mi verkas en la ĉeesto de ĉiuj lingvoj de la mondo". Rilate al la verkisto Rabelais, la lingvopatro en Francio, li jam havis antaŭvidon de ĉi tiu imaga mondo en la 16-a jarcento. Li nutras siajn fulmotondrojn de vortoj kaj ĝojo per ĉiu lingvo, idiomaĵo, ĵargono, idiolekto, babelismo, kanto kaj parolo, populara aŭ teknika, rajtigita aŭ ne, kiujn li trovis. Li malfermis pordon, kiu ankoraŭ estas malfermita al ni...

Ni konas la poetikan potencon de la rakontisto en la kreolaj imagaro kaj literaturo. Kiel verkisto, kiel vi povas akordigi la parolan kun la skriba?

Tio estas neebla tasko, ĉar ili estas du malsamaj mondoj. Aliflanke, la *parola artisto* kaj la *skriba artisto* havas ion komunan. Ili ambaŭ vivas en poezia stato. La poezia stato kompletigas nian ĉiutagan staton, kiu provizas al ni sekurecon, trinkaĵon, manĝaĵon, reproduktadon... Tamen, en la poezia stato, ni vivas en la ĉeesto de amo, frenezo, amikeco, danco, kanto kaj, se diri simple, beleco – ĉiuj tiuj senutilaj aferoj, kiuj efektive estas la signifa celo de la ĉiutaga. Ni ĉiuj devus evoluigi ene de ni la poetikan dimension de ekzisto.

Sed rilate al niaj du artistoj, ili puŝas (kiel ĉiuj artistoj faras) la poezian staton al tre alta intenseco en sia ekzisto, kio igas ilin kreantoj. La poezia stato de la "kreaĵo" estas malpli potenca ol tiu de la "kreanto", kaj tio estas la bazo de iliaj diferencoj en kuraĝo kaj potenco. Ĉiu artisto, ĉiu kreanto, disvolvas "ilaron", kiu estas lia estetiko, lia demandema rilato al beleco. Ni povas tiel utiligi la estetikon de la rakontisto aŭ de la verkisto, por pligravigi la rolon de estetiko kiu kunigas ilin.




© Gilles Elie-Dit-Cosaque / www.lamaisongarage.fr

Nuntempa literatura lingvo estas produkto de ambaŭ estetikoj. La uzo de lingvo estas kie ĉio koncerne al lingvo (tio, kio estas antaŭ, post kaj preter ĝi, la nedirebla, la nekomunikebla) konverĝas kaj renkontiĝas.

Ĝi estas do la bazo por la ekapero de ĉiuj novaj esprimoj. Mi pensas, ke ni jam gajnis la batalon por akordigi la parolan kaj la skriban vorton. La nova horizonto estas akcepti, ke ĉirkaŭ ni, en la vivanta mondo, ekzistas lingvoj de plantoj, insektoj, bestoj – multoblaj neprobablaj alfabetoj, kiujn ni ignoris kaj nun devas reintegri en nian poetikon. Tio estas parto de la ekzista ŝanĝo, kiun ni devas fari fronte al la defioj de la nuntempa mondo. Efektive, ĝi estas ligita al nova imagaro – post-okcidenta, post-kapitalisma, vertikala post-humanisma – kiu estas tiu de Kunligo. La principo de ĉi tiu imagaro estas la *kunligo de tio kio estas apartigita en niaj ekzistoj*.

La nokto estis la loko de la kreola rakontisto, la momento kiam lia vorto regas, kiam la kateno de la sklava potenco estis malpli forta. Kio estas via rilato al la nokto?

La ĉiutaga vivo timas la nokton. La poezio vidas en ĝi mil eblecojn, fonton kaj rimedojn. La antikva kreola rakontisto vivis en la



◥ *Eltiraĵo el la* Lambeaux*-serio de la artisto Gilles Elie-Dit-Cosaque. Konsistante el komparo de fotoj, personaj kaj historiaj dokumentoj, la serio formas taglibron kiu pridubas la nocion de memoro..*

vertikala universo de sklaveca kaj kolonia diskurso. La antikva alfrontas la *Lambeaux*-serion de la artisto Gilles Elie-Dit-Cosaque.

Konsistante el komparo de fotoj, personaj kaj historiaj dokumentoj, la serioj formas taglibron kiu pridubas la nocion de memoro.

La kreola rakontisto vivis en la vertikala universo de sklaveca kaj kolonia diskurso.

Ĉiuj rajtigitaj ebloj kunfluis sole en la pleneco de la mastroj... Sed la nokto malstreĉis ĉi tiun strangoladon. Ĝi permesis al la rakontisto malfermi, ene de li mem kaj ĉirkaŭ li, "flugliniojn", kiel dirus la franca filozofo Gilles Deleuze, eblojn kaj estontecojn.

La nokto enkondukis novajn kreadojn.

Je la tagiĝo de iu ajn kreiva gesto, devas esti simbola katastrofo, kolapso de tio, kio regas niajn mensojn kaj trudiĝas al ni, plenigante antaŭe la paĝon, sur kiu ni devas skribi. Do ni devas malplenigi la paĝon kaj fari salton en la nekonaton, kiu tiam malfermiĝas en la novon.

Ni perdis niajn ligojn kun la nokto, ĉu laŭvorte aŭ simbole, kaj ni devas reeltrovi ilin. Sed, iel, ni ankaŭ devas batali por reenigi, en la okcidentan, kapitalisman tagon, la lumojn (kiuj devas plu flagri) de alia eblo.

Vi ofte parolis pri la ŝlosila rolo, kiun ludis Frankétienne kaj Édouard Glissant en via evoluo kiel verkisto. Kiel vi vidas la demandon pri lingvo kaj literaturo por okcident-indiaj verkistoj nuntempe?

Ni superis la paralizon, kiun ni sentis pro la steriliga konfrontiĝo inter niaj du lingvoj, kreola kaj franca. La venonta poeto devas enkorpigi la poetikon de la deziro-imagado de ĉiuj lingvoj de la mondo.

Tia poetiko povas esti iniciatita nur per la inaŭguraj vortoj de granda poeto, ĉar ĉiam estas poezio, kiu inaŭguras la novajn vojojn de niaj literaturoj.

Frankétienne kaj Glissant malfermis la vojojn por ni. Ili restis malfermitaj. Nun niaj okuloj devas rigardi la horizonton por vidi kio aperos. Ĉar, hodiaŭ, literaturaj fratecoj ne estas plu difinitaj de la malnovaj identecaj indikiloj (mia teritorio, mia lingvo, mia haŭto), sed de la strukturoj de la imago, alivorte, de nia profunda rilato al la konservita diverseco de la mondo, kion ni nomis granda *Diversaleco*. De tiam, niaj komunaj defioj, niaj fratecoj, niaj komunaj estontecoj, povas leviĝi el ie ajn sur la planedo.

Vi revenis al la romano per *La norda vento en la glaciaj filikoj* (Le Vent du nord dans les fougères glacées), post jaroj for de ĉi tiu formo de fikcio. Kial vi revenis al ĝi post tiom da tempo?

Mi revenis kun tio, kion mi nomas *rakonta organismo*. La vivanta uzo de lingvo permesis al ni esti aliancanoj de ĉiuj lingvoj de la mondo. La nocio de rakonta organismo devas helpi nin foriri de la literaturaj dividoj inter romano, eseo, teatro, poezio, fikcio, nefikcio... Sed ĉefe, ĝi permesos al ni eskapi de "rakonto".

> **"La lingvoj de plantoj, insektoj kaj bestoj ekzistas ĉirkaŭ ni, kaj ni devas reintegri ilin en nian poetikon**

Rakonto estas la bazo de la imagaro de *Homo sapiens*. Ĝi servis por produkti malgrandajn, loĝeblajn "realaĵojn" fronte al la neimagebla teruro de la konkreta vivo. Rakontoj trankviligas kaj konsolas nin, simpligante netolereblajn komplikaĵojn. Ni amas feliĉajn finojn. Rakontoj eĉ kaŭzis la *totalisman Grandan Rakonton*, kiu daŭre minacas nin hodiaŭ. Religioj, koloniismo, kapitalismo, fundamentalismo kaj la reveno de faŝismo estas ĉiuj Grandaj Rakontoj, kiuj fortrancas nin de la diverseco de rakontoj, kaj tial de la diverseco de estontecoj en la mondo. Ni ne volas pluajn Grandajn Rakontojn! Nur donu al ni la malfermitan, ĝojan, festan renkonton de ĉiuj rakontoj de la mondo! Tio estas la esenca kondiĉo por tiu alia mondo, kiun ni bezonas imagi. ■

-El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)

Gina Doubleday
UNESKO

Dua Kuriero-Forumo: *Kulturaj interŝanĝoj laŭlonge de la Silkaj Vojoj*

La 15-an de aprilo, la Ĉefsidejo de UNESKO gastigis la duan Forumon de UNESKO-*Kuriero*. Du grupoj de internaciaj fakuloj diskutis la historian influon de kulturaj interŝanĝoj laŭlonge de la Silkaj Vojoj, kaj interkulturan dialogon kaj reciprokan lernadon en la nuntempa mondo. Konforme al la rolo de la *Kuriero* kiel laboratorio de ideoj, la Forumo celas antaŭenigi debaton pri temoj de internacia intereso. La unua Forumo okazis en junio 2018, je la 70-a datreveno de la *Kuriero*.

La evento inkluzivis ekspozicion pri la historio de UNESKO-Kuriero, ekspozicion de infandesegnaĵoj kaj prezentojn de tradiciaj ĉinaj muziko kaj danco.



SPERTULOJ tra la mondo



Doudou Dièn̂e
Eksa Direktoro de la Fako de Interkultura Dialogo de UNESKO



Zhao Tingyang
Profesoro ĉe la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj



David Abulafia Eksa Profesoro pri Mediteranea Historio ĉe la Universitato de Kembriĝo, UK



Elena Paskaleva
Asistanta Profesoro pri Studoj de Kritika Heredaĵo ĉe la Universitato de Leiden, Nederlando



Aya Medany
Olimpika pentatlonisto kaj Ĉampiono por Paco, Egiptio



Susan Denyer
Altranga Konsilisto pri Monda Heredaĵo, ICOMOS



Zhao Shengliang
Prezidanto de la Akademia Komitato de la Akademio de Dunhuang, Ĉinio



Euan Mackway-Jones
Programo-Specialisto de UNESKO pri Inkluzivigo, Rajtoj kaj Interkultura Dialogo



Riccardo Pozzo
Prezidanto de la fako pri Historio de Filozofio ĉe la Universitato de Romo Tor Vergata, Italio



José Cassandra
Eks-Prezidanto de la Regiona Registaro de Principeo



Lyu Zhou
Direktoro de la Nacia Heredaĵa Centro de la Universitato Tsinghua, Ĉinio



Prezidanto:
S-ro Vincent Defourny,
Eksa Direktoro de Publika Informado ĉe UNESKO



Ekspozicio pri la historio de *Kuriero*



Unue lanĉita en **1948**, sub la gvido de Sandy Koffler, usona ĵurnalisto kaj iama milit-korespondanto



La unua numero estis sendita al abonantoj en **15** landoj tra Eŭropo, Azio kaj Ameriko



Nuntempe eldonata en 8 lingvoj: angla, franca, hispana, rusa, araba, ĉina, kataluna, Esperanto



Pli ol 700 numeroj de la Kuriero estis publikigitaj ĝis nun

Eminentuloj kiuj aperis en La UNESKO-Kuriero inkluzive de:



Pola-franca sciencisto
Marie Curie

Israela historiisto
Yuval Noah Harari

Kuba ĵazpianisto
Chucho Valdés

Hispana pentristo
Joan Miró

Pakistana aktivulo pri homaj rajtoj
Asma Jahangir

Franca antropologo
Claude Lévi-Strauss

Kenja socia kaj media aktivulo
Wangari Maathai

Bangladeŝa dezajnisto
Bibi Russell

Hinda socialreformanto
Kailash Satyarthi

Itala ekologiisto kaj politikisto
Giuseppina Nicolini

Konga aktivulo pri homaj rajtoj
Denis Mukwege

-El la angla esperantigis Paolo Omodei-Zorini (Italio)

Bintou kaj Issa en Maŭricio



En ĉi tiu dua titolo de la bildlibroserio Bintou kaj Issa, la ĝemeloj, iliaj geavoj kaj plej proksimaj amikoj vizitas Maŭricion laŭ la paŝoj de malproksimaj prapatroj kiuj laboris sur la sukerplantejoj tie.

La nova rakonto kondukas legantojn en nekredeblan aventuron sur ĉi tiu grandioza insulo, ĝia historio kaj ĝia kultura heredaĵo, kaj per tio invitas ilin lerni pri sklaveco.



Disvolvita kadre de la projekto Itineroj de Sklavaj Popoloj de UNESKO, la serio estas destinita por konsciigi junajn legantojn (5-9), en amuza kaj alirebla maniero, pri la historio de sklaveco kaj ĝiaj nuntempaj sekvoj.

UNESCO Publishing/Language du Sud
978-92-3-100671-5
40 pages, 200 x 200 mm, paperback, 8 €

Baldaŭ aperonta

Tago de Homaj Rajtoj

10 decembro 2024

Niaj lingvoj,
Niaj rajtoj,
Nia estonteco,
Nun!

Universala Esperanto-Asocio
uea



Mozi, Serio da Libroj de Zaozhuang-a Universitato pri Esploro kaj Diskonigo pri Ĉina Kulturo

Mozi (ĉ. 478 a.K.-392 a.K.), filozofo, edukisto, sciencisto kaj strategiisto en antikva Ĉinio, iniciatinto de Mohismo. La penso Makroamo de Mozi entenas la signifon de egaleco kaj homamo.

Abonu *Kurieron*

UNESKO-Kuriero estas eldonita en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj ankaŭ en la kataluna kaj Esperanto.













Abonu la presitan version en ĉiu trimonato aŭ abonu 100% senpage la bitversion.

Malkovru niajn ofertaĵojn

http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn;
https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero//

https://en.unesco.org/courier • https://fr.unesco.org/courier
https://es.unesco.org/courier • https://ru.unesco.org/courier • https://ar.unesco.org/courier • https://zh.unesco.org/courier